

V-19034/1989


中國報通


1989


EL POPOLA ĈINIO



- Mi kaj Miaj Esp-instruistoj
- Rompi "Feran Bovlon"
- Sendrogaj Terapioj de la Ĉina Medicino
- Pezaj Bazarkorboj







INTER NI

Ni disdonis al niaj legantoj enketilojn kune kun la 6-a numero de 1988 kaj ricevis ĝis la fino de septembro 246 enketilojn el 28 landoj kaj regionoj. Ni serioze konsideras kaj akceptas opiniojn de niaj legantoj. Sube estas parto de iliaj opinioj.

La Red.

● Notinda estas via intereso por la plibonigo — malbezonebla — de la prezentado de pluraj objektoj, precipe la ĉina vivo kaj moroj, ĉar tiuj temoj incitas grandan scivolecon inter la okcidentaj gentoj.

J.B.CPOS (Brazilo)

● Laŭ mia opinio ĉiuj artikoloj estas valoraj. Tamen inter ili mi pli ŝatas legi pri “Vojaĝo laŭ Jangzi-rivero”. Tiuj artikoloj disvolviĝas kiel instrua filmo, kiu science kaj aventuro informas min pri realaj geografiaj statoj kaj homaj streboj en regionoj nekonataj.

G. MAZAUD (Francio)

● Mi nur bedaŭras, ke la nigraj-blankaj bildoj ne havas sufiĉan kvaliton. Klopodu al plibonigo, mi petas.

A.V.D.HEID (FR Germanio)

● Mi pensas, ke tre interesan mapon “Lokoj Menciitaj en Ĉi Tiu Numero” estas necese kompletigi per numeroj de paĝoj, sur kiuj troviĝas lokoj menciitaj, ĉar ne estas simple troveblaj en la revuo necesaj lokoj.

S.ALEKSANDR (USSR)

● Mi ŝatas plej la artikolojn, kiuj pritraktas la ĉinan literaturon, speciale la poezion. Dank’ al EPĈ, en lastaj numeroj estas multe da poemoj, mi ankaŭ tradukas ilin por mia propra amuzo.

R.AIMO (Finnlando)

● Kurantaj aferoj baldaŭ perdos la intereson, (kiam ili iĝos malkurantaj).

M. J. CHARTIER (Usono)


ENHAVO

- 6 **Novjara saluto**
- 18 **FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:**
Pezaj bazarkorboj
- 54 **VOJAĜO LAŬ YANGZI-RIVERO (25):**
Poyang-lago — la plej granda dolĉakva lago de Ĉinio
- 15 **Rompi "Feran Bovlon"**
- 24 Scienc-esplora stacio sur stepo
- 32 Librejo Sanwei
- 28 **ĈINA LITERATURO:**
Renoviga kampanjo de poezio kaj prozo en la meza periodo de la Norda Song-dinastio
El verkoj de Ouyang Xiu kaj Wang Anshi
- 38 Arto floras ĉe ordinaraj popolanoj
- 59 **ĈINAJ ARTOJ:** La pejzaĝa pikturo de Ĉinio
- 12 **LIBERA FORUMO DE EMINENTAJ E-ISTOJ:**
Mi kaj miaj kvin Esperanto-instruistoj
- 6 Renkontiĝo en Zagrebo
- 35 **SUR NIA LIBROBRETO**
- 41 **POR KOMENCANTOJ:**
Liftistino
- 14 **ESP-NOVAĴOJ**
- 52 **ĈINA MEDICINO:**
Sendrogaj terapidoj de la ĉina medicino (II)

- 42 Ekzameno de la sportaj fortoj de Ĉinio
- 45 Festo de Taishan-monto
- 50 La landlima urbo Manzhouli
- 9 **EKSTERLANDANOJ PRI ĈINIO:**
Malgrandaj fenestroj
- 48 UNO por la monda malstreĉiĝo
- 36 **KURANTAJ AFEROJ**
- 4 **INTER NI**
- 34 **Refoje pri transskribo de ĉinaj propraj nomoj**
- 30 51 **KORESPONDI DEZIRAS**
- 4 Falakvo (Foto)
- 23 Legendo de Heĝe-nacieco (Ĝenroj de nacimalplimultoj)
- SUR LA KOVRILO:**
Junulino en moda kostumo de Ji-nacieco
- INTERNE DE LA KOVRILO:**
La Ĉiela Altaro en Pekino
La Ĉiela Altaro konstruita en 1420 estas la plej granda antikva kulta konstruaĵaro. Nun ĝi jam fariĝis parko kun totala areo de 2.7 milionoj da kvadrataj metroj. En la foto estas la Preĝejo de Riĉa Rikolto plej impona en la parko, kun alto de 38 metroj kaj diametro de 30 metroj.
- SUR LA DORSKOVRILO:**
FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ
En Roterdamo
Poldera pejzaĝo proksime de Roterdamo de **HOOGELAND** (Nederlando)

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Subregiono Xilinguole
- 2. Tai'an
- 3. Manzhouli
- 4. Ŝanhajo
- 5. Kantono



NOVJARA SALUTO

ĈE la sojlo de la nova jaro la personaro de la redakcio de "El Popola Ĉinio" salutas la karajn legantojn kun elkoraj bondeziroj kaj la reformita revuo.

Efektive la reformo de la revuo estas rezulto de la komuna klopodado de la legantoj kaj la personaro de la redakcio. La entuziasmaj leteroj el diversaj lokoj de la mondo kaj la sinceraj paroloj en la kunsido de EPĈ-legantoj en Roterdamo en 1988 kuraĝigas kaj helpas nin en plibonigo de nia laboro.

La malklareco de nigra-blankaj bildoj malkontentigis la legantojn, kaj ni ŝanĝos la specon de papero kaj la presmanieron. Krome, ni mallongigos la artikolojn kaj aldonos 8 paĝojn da koloraj bildoj.

Niaj legantoj esperas aŭdi voĉon de famaj esperantistoj de diversaj landoj. Pro tio ni instalas la rubrikon "Libera Forumo de Eminentaj E-istoj" por publikigi iliajn artikolojn verkitajn speciale por nia revuo.

Ĉi-jare estos la 40-a datreveno de la fondiĝo de la nova Ĉinio, kaj ni daŭre kaj objekte raportos el malsamaj flankoj pri diversaj ŝanĝiĝoj en Ĉinio. En la novaj rubrikoj "Facetoj de la Ĉina Socio" kaj "Intervjuoj" ni konigos la ĉinan socion, la laboron kaj la vivon de ordinaraĵoj ĉinoj, kiuj interesas niajn legantojn.

Ni publikigos artikolo-serion "Laŭ la Suda Silka Vojo" kaj malfermos la rubrikon "La Imperiestra Palaco". La artikolo-serio konigos al niaj legantoj antikvan vojon, kiu aperis du jarcentojn pli frue ol la norda silka vojo. La suda silka vojo komenciĝis de Xi'an, ĉefurbo en antikveco, trairis la ĉinajn sudokcidentajn provincojn Sichuan kaj Yunnan kaj fine kondukis al Birmo kaj Hindio. Ambaŭflanke de la vojo la pejzaĝoj estas ĉarmaj, antikvaĵoj abundaj kaj moroj interesaj. La rubriko "La Imperiestra Palaco" sisteme konigos la arkitekturon, trezorojn kaj okazaĵojn en la Imperiestra Palaco.

Ni esperas, ke la reformita "El Popola Ĉinio" estos bonvena al niaj legantoj kaj ili helpos nin daŭre plibonigi ĝin.

La Red.

PAN YUJUAN:

RENKONTIĜO EN ZAGREBO




La kongresejo

DE la 15-a ĝis la 22-a de julio 1988 okazis en Zagrebo de Jugoslavio la 44-a Kongreso de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. En la kongreso mi amikiĝis al junuloj de malsamaj nacioj kaj kredoj el diversaj landoj. En tiuj tagoj, dank' al la entuziasma akceptado de la gastigantoj, mi vivis en granda internacia familio plena de paco, amikeco kaj gajeco. La tagoj gravuriĝis en mia memoro.

En 1988 estis la 50-a datreveno de la fondiĝo de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. La 44-a Kongreso estis tre signifa por la junaj esperantistoj de la mondo. La kongresa temo estis "Komunikado en la 21-a Jarcento".

La kongreson ĉeestis pli ol 700 junaj esperantistoj el 46 landoj. La plej junaj kongresanoj, la 3-jara Mira Metz-Fleury kaj la 4-jara Damir Metz-Fleury, venintaj al la kongreso kune kun siaj gepatroj, estis ŝatataj de ĉiuj. Al la kongreso venis ankaŭ mezaĝaj kaj maljunaj esperantistoj.

La aranĝo de la kongreso estis




La aŭtoro (la dua de dekstre) kaj ŝiaj amikoj



Farado de paperaj gruoj

Libroservo por la kongreso





Kongresanoj el Ĉinio

multe pli enhavoriĉa ol la pasintaj. Bonvenaj estis kolokvoj pri scienco, tekniko kaj lingvistiko, en kiuj prelegis 10 esperantistoj de Jugoslavio,

Hungario, Nederlando k.a. Aŭskultantoj kaj la prelegantoj povis diskuti pri ajna vidpunkto, kio multe vigligis la atmosferon de la kongreso.

La kongreso okazigis sportajn konkursojn. Sporto-amantoj el la kongresanoj faris konkursojn de korbopilko kaj piedpilko. Malgraŭ la diverseco de naciecoj, la teamanoj ludis en bona kunagado. La konkursoj altiris multajn rigardantojn. Mi diris al apudsidanta itala amiko, ke antaŭ kelkaj jaroj la Ĉina Virina Flugpilka Teamo konkursis kun la internacia stelulina teamo. La lasta konsistis el diverslandaj elstaraj sportistinoj, tamen ĝi estis venkita de la ĉina teamo pro nebona kunagado. La amiko diris al mi kun rido: "La internacia stelulina teamo mal-

venkis eble pro la neuzo de Esperanto. Lingvobaro kaj neebleco de interŝanĝo de sentoj kaŭzis la malvenkon."

La gastigantoj aranĝis por la kongresanoj varieteon el naciaj kantoj kaj dancoj. La jugoslavaj kantoj kaj dancoj kun loka gusto kaj rapida ritmo rikoltis senĉesan aplaŭdadon. Post la prezentado kongresanoj ĉirkaŭis la aktorojn por peti ilian instruadon. La aktoroj ĝoje konsentis ilian peton. La junaj kongresanoj baldaŭ ellernis la fundamentajn movojn de jugoslavaj dancoj. En akompano de orkestro, ili ekdancis jugoslavan dancan rondon, manon en mano. Ankaŭ mi, kvankam malofte dancis, interesiĝis pri la danco kaj ekmoviĝis.

Dum la kongreso mi ofte renkontis legantojn de "El Popola Ĉinio". Aŭskultante ilian laŭdon al la gazeto, mi ne malstreĉis la atenton al iliaj kritiko, deziro kaj peto. Ili esperis pli da artikoloj pri

la vivo de la ĉina popolo kaj la tradicia kulturo de Ĉinio. Parto de ili esperis amikiĝi al ĉinaj esperantistoj kaj viziti Ĉinion.

Mi sentis grandan ĝojon, kiam mi renkontiĝis kun mia amiko Andrzej, kiu korespondis kun mi jam kvar jarojn. Li estas polo kaj ŝatas fotadon. Li ofte sendis al mi fotojn pri la polaj pejzaĝoj kaj moroj. Mi konis lin kaj liajn familianojn pere de liaj fotoj. La renkontiĝo en Zagrebo pliintimigis nin.

Dum la kongreso mi renkontiĝis kun fremdlandaj amikoj, kun kiuj mi konatiĝis en Pekino, kaj akiris ankaŭ multajn novajn amikojn. Jean el Irlando diris al mi: "Mi tre ĝojas, ke mi konatiĝis kun vi. Vi estas mia unua ĉina amiko. Mi esperas amikiĝi al pli multaj ĉinaj esperantistoj."

Venis adiaŭo. Ni disiĝis, sed nia amikeco longe restos. Ni havas saman deziron -- renkontiĝi en la venonta kongreso.

EKSTERLANDANOJ PRI ĈINIO

MALGRANDAJ FENESTROJ

de **CHEN BAOHE**

TIUJ ĉi fotoj plenaj de vivo-intereso estas faritaj nek de fotistoj de nia revuo nek de aliaj ĉinaj fotistoj, sed de eksterlandanoj, kiuj vizitis Ĉinion en la lastaj jaroj aŭ nun vivas ĉi tie.

En la lastaj dek jaroj, kun la malfermo de Ĉinio, pli kaj pli multaj eksterlandanoj venas al Ĉinio por vojaĝo, vizito, komercado aŭ laboro. Multaj el ili registris per sia fotilo scenojn propraokule viditajn en Ĉinio. Ĝuste laŭ la faktoj la redakcio de la revuo Ponto de Ĉinio okazigis du internaciajn ekspoziciojn de fotoj sub la titolo "Eksterlandanoj pri Ĉinio" en 1987 kaj 1988. La ĉi tie aperigitaj fotoj estis elektitaj el la dua internacia ekspozicio de fotoj okazigita en septembro 1988.

La ekspozicioj estis laŭdataj de eksterlandaj turistoj, komercistoj, studentoj lernantaj en Ĉinio, specialistoj kaj alilandaj diplomatoj en Ĉinio. Ĉ. mil personoj sin anoncis al la dua ekspozicio kaj sendis al ĝia organizanto proksimume dekmil verkojn, el kiuj 400 estis elektitaj al la ekspozicio.

Tra la malgranda fenestro malfermita de la fotoj vi povas vidi modernajn konstruaĵarojn aperantajn en la vasta Ĉinio, malnovajn kaj malaltajn loĝdomojn starantajn apud la nove konstruitaj domegoj, maljunulojn vendantajn tradiciajn ludilojn ĉestrate kaj urbanojn tempopasigantajn en parko. En tiu foto pri strata sceno vi povas vidi epizodon en la vivo de ĉinaj urbanoj: pasaĝeroj unuanime puŝantaj paneantan aŭtobuson. En alia foto vi povas vidi budhisman aktivadon de tibetanoj, unu el la ĉinaj nacimalplimultoj. Eble ĝi povos rememorigi al vi, ke Ĉinio estas lando kun 55 nacimalplimultoj.



Instruisto kaj lernantoj

Foto de HIROTA NORIYOSHI (Japanio)

Geedziĝa foto

Foto de NARAYAN (Bangladeŝo)



La aŭtobuso sen-
moviĝis Foto de
TOMAS MIRKE (FR
Germanio)



En Shenzhen Foto
de VICTOR KORNI-
YUSHIN (Sovetio)

Stando Foto de ELLEN SCHAEFER
(Usono)





Atendo

Foto de ERHARD HURSCH (Svisio)



Religiuloj

Foto de CARL-HEINE KOCH (FR Germanio)

Kolportanto de vent-radoj

Foto de K.F.WONG (Malajzio)



MI KAJ MIAJ KVIN ESPERANTO-INSTRUISTOJ

de CHEN YUAN

Chen Yuan, vicprezidanto de ĈEL, estro de la Ĉina Ŝtata Komisiono pri Lingvo kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, estas fame konata specialisto de socia lingvistiko. Per priskribado pri liaj kvin Esperanto-instruistoj, la artikolo rakontas al ni, kiel li lernis Esperanton kaj verkis en la lingvo en sia junaĝo.

La Red.

Mi ekkonis Esperanton per la artikolo de A. A. Sofio aperinta en la gazeto "Mezlerneĵano". Mi ĝin lernis kun la celo legi mondfamajn verkojn. Tio okazis en 1931, kiam mi studis en la supera mezlernejo sub Zhongshan-Universitato en Kantono. Mi anoncis min al la Esperanta Porinstruista Seminario kaj lernis la lingvon de la 7-a ĝis la 9-a horo vespere. La lernado daŭris 6 monatojn. S-ro Hsu W.K. estis mia unua Esperanto-instruisto. Li estis instruisto de Qing-dinastio (1644-1911), kaj laŭdire, unu el la plej fruaj ĉinaj studentoj en Francio. S-ro Hsu W. K. ĉiam akurate venis al la seminario por doni lecionon eĉ en tagoj de pluvo kaj vento kaj estis severa al siaj lernantoj. Komence, en la seminario lernis pli ol 60 personoj, sed je la studfino restis nur unu kaj duona personoj. Mi estis unu el ili, kaj la "duono" — junulo Wei Dingming, kiu havis tiam okupon kaj ne povis ĉiuvespere ĉeesti lecionon kiel mi. Pasintjare li revenis de eksterlando kaj vizitis min. Nia lernolibro estis

"Fundamento de Esperanto" de Zamenhof; min tre interesis la fabelo "La Feino" de Andersen. Krome, li lernigis al ni ankaŭ aliajn facilajn legaĵojn. S-ro Hsu W. K. postulis, ke ni parkere legu ĉiun tekston. Lia prononcado estis influita de s-ro de Beautront, kaj la vokaloj estas elparolataj iom mallarĝe, tio ankaŭ influis min. Post 6 monatoj mi sukcese trapasis la ekzamenon kaj ricevis diplomon. Poste mi ofte iris al la malgranda biblioteko de la seminario por pruntepreni Esperantajn librojn. Fakte ĝi havis nur unu libroŝrankon. Tiam mi legis preskaŭ ĉiujn librojn konservatajn en la ŝranko kaj petis s-ron Hsu W. K. klarigi al mi la nekomprenejaĵojn. Mia flua parolado en Esperanto ja rezultas el instruado de la instruisto, kiu helpis al mi meti solidan bazon ĉi-flanke.

Rilate al parola ekzercado, mi ne povis forgesi mian duan Esperanto-instruiston. Li estis hungara inĝeniero Fedorĉak. En 1933 aŭ 1934 li venis de Sovetunio al Ŝanhajo, kaj poste transloĝiĝis al komuna loĝejo "domo por ordinarioj" en Kantono. Mi informiĝis de ŜEL pri lia alveno kaj ofte vizitis lin post leciono, kun la Plena Vortaro eldonita de SAT. Li rakontis al mi multon pri Sovetunio, kio plej altiris min. Post du monatoj evidente altiĝis mia parolkapablo. En 1986, kiam mi vizitis Hungarion, mi demandis multajn sam-

ideanojn, sed bedaŭrinde, neniu havis informon pri li.

En la komenco, sen helpo de s-ro Ĵelezo mi ne povus kompreni, por kio mi lernis Esperanton. Tial Ĵelezo meritas esti mia tria Esperanto-instruisto. En la fino de 1931 aŭ en la komenco de 1932 aperis "La Mondo". Aĉetinte la unuan numeron de la gazeto, mi tuj skribis al ĝia redakcio kaj ricevis la respondon subskribitan de Ĵelezo post unu semajno. En la unuaj leteroj li klare montris al mi, ke li lernis Esperanton ne sole por posedi la lingvon mem, sed ankaŭ por servi al la progresema afero de la homaro per Esperanto. Li diris ankaŭ, ke li lernis Esperanton por serĉi la veron. La diro forte inspiris min. Lerni Esperanton por la homaro, por la estonteco kaj por la vero! Preskaŭ ĉiusemajne ni interŝanĝis po unu leteron. Kiam mi legis lian leteron, mi tre emociiĝis. La stilo estis flua, la enhavo riĉa kaj la tono intima. Unuvorte, al tiu instruisto mi ŝuldas mian entreprenadon de la progresema afero. Kiam mi lernis en universitato, mi partoprenis en la movado de studentoj, t.e. kontraŭjapana kaj nacisava movado, sub lia edifo.

Poste mi plurfoje kontribuis al "La Mondo" per artikoloj plejparte pri Esperanta gramatiko. En 1936 oni kolektis la artikolojn de Ĵelezo, Tikos kaj mi kaj ilin eldonis en libroformo. En 1986 la libro estis



La aŭtoro (la unua de maldekstre) en interparolo kun Zhang Qicheng (la dua de maldekstre) kaj Jelezo (la dua de dekstre)

represita en Chongqing. Ankaŭ tiuj miaj artikoloj estas skribitaj sub zorgado de Jelezo.

Foje, mi sendis mian prozon en Esperanto al la redakcio de "La Mondo". Post nelonge mi ricevis la respondon subskribitan de Ĉ. Ĉen, kiu funkcias nun kiel ĝenerala sekretario de ĈEL. Tiutempe li estis unu el la redaktoroj de "La Mondo". Li malkaŝe montris al mi, ke la artikolo estas senenhava, kaj oni devas raporti pri reala vivo, kaj nur tio havas signifon. Li proponis, ke mi persone spertu realan vivon kaj poste skribu artikolon. Tio forte skuis mian animon, kaj mi faris laŭ lia konsilo. Mi decidis intervjui rikiŝistojn, kiuj vivis en la plej suba tavolo de la socio. Ili loĝis en kaduka kabano en mallarĝa strateto. Tie funkciis opifumejo kaj hazardludejo. La plejparto de ilia mono estis forprenita de mastraĉoj de la fumejo kaj hazardludejo. Dum semajno, ĉiutage mi iris al ili por kune trinki teon kaj babili pri ĉio. Tiel mi bone sciis ilian ĝojon kaj malĝojon kaj ver-

kis mian unuan realisman verkon en Esperanto "Vivo de Rikiŝistoj". Mi ĝin sendis al la redakcio de "La Mondo", kaj ĝi estis aperigita. Poste mi verkis artikolon pri la vivo de laboristinoj en ŝpinteksejo kaj silkteksejo, kaj ankaŭ ĝi aperis en "La Mondo". Kvankam la materialoj estis kolektitaj el fabrikoj de Kantono, tamen en la rakonto mi ne menciis la urbon, ĉar mi timis vekti atenton de la urba registaro. Oni povas diri, ke mia kvara Esperanto-instruisto Ĉ. Ĉen kondukis min sur la vojon al realismo.

Mia kvina Esperanto-instruisto estas s-ro L. Sujen, kiu forpasis en la komenco de la 70-aj jaroj. Li lernis en Zhongshan-universitato kaj fondis la Esperantan societion "La Verdemularo" de la universitato. Li, kun la alia nomo Liang Chunfu, poste fariĝis fama komentariisto pri internaciaj problemoj. Tiutempe li studis en universitato, kaj mi lernis en supera mezlernejo. Li diris al mi: "Mi aŭdis, ke vi lernas Esperanton. Mi havas multajn Esperantajn librojn. Vi povas

legi ilin en ĉiu ajn tempo." Kompreneble, mi ŝatis legi la librojn, kiuj plivastigis mian vidkampon. Li studis filozofion kaj posedis ankaŭ multajn aliajn librojn, tial mi prunteprenis de li ankaŭ librojn pri sociaj sciencoj. La societo eldonis la gazeton "La Verdemulo". Antaŭ kelkaj jaroj mi vidis ĝin en la Internacia Muzeo de Esperanto en Vieno. Tio signifas, ke ĝi estas influhava. Li tiam proponis al mi verki traktaĵojn kaj direktis min en esplorado pri sociaj problemoj de Ĉinio. Mi skribis la artikolon "La Virina Vivo en la Socio de la Antikva Ĉinio", kiu konigis la malaltan politikan pozicion de virinoj en la malnova Ĉinio. Ĝi estas mia unua disertaĵo.

La kvin Esperanto-instruistoj donis al mi multan edifon en lernado de Esperanto kaj partoprenado de Esperanto-movado. El ili du jam forpasis; pri la hungara instruisto ĝis nun mi ricevis neniun informon; kaj Jelezo kaj Ĉ. Ĉen nun vivas sane kaj kontribuas por la Ĉina Esperanto-movado. Ili restos miaj intruistoj.

●La Hebei-a Esperanto-Asocio fondiĝis en la 18-a de septembro 1988. Ĝi estas la 26-a provincline-laspeca asocio ĝis nun fondita en Ĉinio.

●La Pekina Instruista Universitato ekfunkciigis en septembro 1988 nedevigan Esp-kurson, kiu daŭros unu jaron. La kurson gvidas Licus, vicprofesoro de la fremdlingva fakultato de la universitato, kun pli ol 70 lernantoj el diversaj fakultatoj.

●La volumo "Lingvistiko kaj Ideografio" de "Enciklopedio de Ĉinio" eldonita de Ĉinio en februaro 1988 enhavas la artikolojn "Internacia Helpa Lingvo" kaj "Esperanto" skribitajn de Licus, unu el la kompilintoj de la volumo.

●Kunsido de Esperantistoj de Guangdong-provinco, Hongkong, Aŭmen kaj Hajnan-provinco iniciatita de la Guangdong-a Esperanto-Asocio okazis en la 18-a de septembro 1988 en Kantono. La kunsidon prezidis prezidanto de la asocio s-ro Dong Shiyang. Ĝin



En la kunveno por la fondiĝo de la Hebei-a Esperanto-Asocio

ĉeestis ankaŭ s-roj Huang Lunjia kaj Zhu Zhaohong el Hongkong, s-ino Zheng Zhouyan el Aŭmen kaj reprezentantoj de la Esp-asocioj de Hainan-provinco, la Speciala Ekonomia Distrikto Shenzen kaj la urbo Zhongshan. La ĉeestantoj interŝanĝis opiniojn pri disvolvo de la Esperanta laboro kaj apliko de Esperanto en la kampoj de scienco, tekniko kaj ekonomio.

●La Scienc-teknika Filio kaj Ekonomia kaj Komerca Filio de la Esp-Asocio de la Orientĉinia Instruista Universitato fondiĝis en la 1-a de oktobro 1988 en Ŝanhajo.

●La 8-an de oktobro 1988 la Pekina E-Asocio okazigis vesperon por bonvenigi japanan junularan E-grupon kun 62 membroj de Oomoto. S-ro Zhou Mingzhen,

membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj donis, en la nomo de ĈAS, al s-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, la premion "Verda Kosmo", kiun oni disdonis okaze de la 2-a Internacia Akademika Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto en Pekino. La grupo vizitis Ŝanhajon, Qingdao kaj Pekinon.

●Dum la deĵorjaro 1987-88, UEA sukcesis interveni en formalajn debatojn. Dum la Internacia Konferenco pri la Rilato inter Malarmado kaj Evoluigo (24 aŭgusto-11 septembro 1987), UEA prezentis buŝe kaj skribe referaĵon "Aspektoj de Komunikado en la Ligo de Malarmado-evoluigo". Dum kunsidoj de la Prepara Komitato por la Tria Speciala Sesio de la Ĝenerala Asembleo pri Malarmado (25 januaro-5 februaro 1988), UEA denove intervenis skribe kaj buŝe per referaĵo "La Mankanta Ligo en Realigo de Malarmado kaj Evoluigo". Dum la Tria Speciala Sesio mem (31 majo-25 junio 1988), UEA ne ricevis permeson buŝe interveni, sed ĝi ja sukcesis enprotokoligi skriban intervenon, kiu enhavis interalie la rezolucion pri Esperanto de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en 1985.

●De la 6-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1988 la Sennacieca Asocio Tutmonda kongresis en la urbo Campos Do Jrodao, Brazilo. La renkontiĝo estis la 2-a SAT-Kongreso ekster Eŭropo kaj la 1-a en la Tria Mondo, tamen, laŭ la eŭropanoj mem, ĝi estis la plej bona kongreso de SAT ĝis nun.

Ĉina kaj japana esperantistinoj en interparolo



ROMPI "FERAN BOVLON"

EN dekoj da jaroj Ĉinio praktikis la politikon "malalta salajro, ĝenerala labordonado", por ke ĉiuj civitanoj havu profesion kaj povu sin vivteni. En 1985 Ĉinio ĝojis pro la enoficiĝo de 35 milionoj da homoj en la Sesa Kvinjara Plano (1981-1985). Tiam la Novaĝ-agentejo Xinhua (Ŝinhŭa) raportis: "Evidenta kresko de la armeo de laboruloj urbaj kaj kamparaj fariĝis grava marko de senĉesa progreso de la ĉina socia produkta forto."

Sed tri jarojn post tio, dum la senĉesa profundigo de la reformo de la ĉina ekonomia sistemo, aperis latentia armeo de senlaboruloj.

"Ĝenerala labordonado" rezultigis, ke la nombro de laboristoj en multaj entreprenoj grave superis la bezonatan. Statistiko el Ŝanhajo raportis, ke 78-98% de la entreprenoj de 16 industriaj branĉoj havas superflujajn laborulojn, kiuj konsistigas 14-25% de la totala laboristaro. Kalkulo konservativa montris, ke almenaŭ 700 mil laboristoj en Ŝanhajo ne havas laboron en la entreprenoj.

Se "ĝenerala labordonado" kulpis en la estiĝo de la armeo de senlaboraj laboruloj, oni povas aserti, ke la dumviva ofico de la laboruloj kaj la laŭgrada salajro katenis la entreprenojn en memdeci-

da dispono je iliaj laboruloj konforme al la bezono de la maksimuma profito. Statistiko de koncerna departemento raportis, ke duono de la laborhoroj en la ĉinaj entreprenoj estas malŝparita.


Ekde la reformado, la ŝtato alprenis serion da rimedoj, ekzemple doni al fabrikestroj pli da decidpovoj, adjudiki entreprenojn al individuoj ktp. Sed la dumviva ofico kaj dumviva salajrodono ne estis radikale reformitaj, tial la entreprenoj ne povis altigi la produktivecon kaj elvolvi la plej bonan ekonomian efikon.

En 1982, iuj entreprenoj de Henan-provinco jam komencis postenigi sur helpajn laborojn la superflujajn laborulojn de la fronto. Tiun metodon oni nomis laborgrupigo. Sed tiam la entreprenoj ne povis solvi la problemojn pri salajro, bonstatiga rajto kaj personara sistemo, sekve la reformo abortis en mallonga tempo.

Ekde 1984, la entreprenoj de Ĉinio aplikis la politikon de kontrakta dungo. Ĝi estis defio al la malnova politiko de labordonado. La entreprenoj povis memdecide sin reguligi laŭ la bezono de la produktado, limigi la nombron de laboruloj kaj ebligi al la laboristoj libere elekti profesion.

En la posta duono de 1987, en la daŭra reformado, avantaĝa regroupigo estis metita en la tagordon pro ĝia ŝlosila rolo en plialtigo de produktiveco, kaj samtempe la kompletiga reformado estis alprenita al la salajro, enoficiĝo kaj bon-

Cao Qingmao, nova estro de la analiza sekcio de la Naŭa Muelejo de Pekino



statego. Ĝiaj ĉefaj enhavoj estas: nuligi dumvivan oficon de kadroj kaj laboristoj, renovigi la instalon de diversaj postenoj konforme al la bezono de la produktado; denove grupigi la laborulojn laŭ la principo “memvola surposteniĝo kaj labordono al pli taŭgaj personoj”, nome la kadroj povas elekti preferatajn laboristojn dum laboristoj povas labori sub preferataj kadroj, por ke formiĝu plej efika laborgrupo kaj altiĝu la produktiveco de la entreprenoj. Ĉirkaŭ 300 entreprenoj de Pekino aplikis la reformadon de avantaĝa regroupigo.

En la pasintaj multaj jaroj oni kutimiĝis al la unufoja labordono por la tuta vivo. Se oni akiris oficon, ili neniam ekŝiĝos aŭ malpromociiĝos, se nur ili ne faros gravan eraron, malgraŭ ke ili tute ne taŭgos por la ofico, aŭ ilin ne bezonas la entrepreno.

Avantaĝa regroupigo forigis ilian trankvilecon je la ofico kaj profesio.

Laboratorio de la Naŭa Farun-fabriko de Pekino aplikis avantaĝan regroupigon, kaj rezulte de tio la antaŭa estro fariĝis laboristo, dum 26-jara laboristo fariĝis estro de la laboratorio post publika ekzameno. Li diris: “Sen la avantaĝa regroupigo mi neniam povus elpaŝi kaj restus laboristo dum la tuta vivo.”

La Pekina Dua Aŭto-fabriko havas 7000 personojn. Kiam la fabriko komencis la avantaĝan regroupigon, la fabrikestro senvalidigis la oficojn de la 2001 kadroj, kaj la bezonataj kadroj devis instaliĝi laŭ la principo “memvola surposteniĝo kaj labordono al pli taŭgaj personoj”. Post publika adjudiko, 83 el la 136 mezgradaj kadroj de la fabriko restis sur la antaŭa posteno, 387 ordinaraj administrataj kadroj estis deoficigitaj, dum 24 ordinaraj laboristoj paŝis sur la postenon de administrado. La “dumviva restado sur la posteno” de la kadroj estis ŝancelita, kaj la

“fera bovlo”—“dumviva ofico” de laboristoj falis el ilia mano. Neler-taj aŭ maldiligentaj laboristoj estis depostenigitaj en la avantaĝa regroupigo kaj fariĝis eksteretataj. En kelke da tagoj 1200 personoj estis forstrekita el la etato. Laŭ la decido de la fabriko, tiuj “eksteretataj” laboruloj estis senrajtigitaj je mon-premio en la unua monato kaj salajrataj je 80% de la antaŭa salajro en la dua monato kaj 70% ekde la tria monato. La enspezoj de tiuj eksteretataj laboruloj tuj reduktiĝis, kaj cetere ili malfacile povis elteni la humiliĝon.

En Pekino, iu laboristo ĵus proklamita kiel “provizora senlaborulo” entrudiĝis en la kabineton de la laboreja estro kaj deprenis el lia mano la bovlon kun minaco: “Vi forkaptis mian bovlon, do ankaŭ vi malsatu!” En Qingdao (Ĉingdaŭ) maljunaj laboristoj eksteretataj pro la avantaĝa labor-grupigo diris, ke ili preferas fruiĝi emeritiĝon ol fariĝi eksteretataj.

La laboristoj, antaŭe zorgataj de la ŝtato je malsaniĝo kaj maljuniĝo, nun fariĝis superflua laboruloj, estis senigitaj je la garantio kaj perdis la psikan ekvilibron pro la principo “premio por diligentuloj kaj puno al mallaboremuloj”.

Sed tamen tiuj eksteretataj laboruloj ne estas komplete flankenpuŝitaj, ĉar tion ne permesas la reala situacio de la ŝtato. La entreprenoj devas doni al ili ian laboron. Ni donu ekzemplon. La Pekina Dua Aŭto-fabriko fondis servokompanion, riparejojn kaj kelkajn helpajn sekciojn por doni laboron al tiuj superflua personoj. Krom tio, la fabriko fondis merkaton de laborfortoj — kabineto por personoj laboratendantaj, kiu zorgas pri labordono al la eksteretataj laboruloj, akcepto de tiaj personoj forstrekita el la etato de la filiaj fabrikoj kaj iliaj laborejoj. Kiam laborejoj bezonas laborulojn, la kabineto havigas al ili. Pro tiuj rimedoj la tuta personaro de la fabriko

Post la avantaĝa regroupigo ekslaboristo el la Naŭa Muelejo de Pekino Zhang Jinbo fondis sian barbirejon.





Tiuj "senlaborulinoj" en la fabriko plendas pro sia situacio.

konsciis, ke de tiam ili ne havos plu en sia mano la "feran bovlon". Malmultiĝis la enspezo de portempe senlaboraj personoj, dum la nove instalitaj personoj sentis minacon de perdo de la laboro.

Atendi laboron en la entrepreno ne signifas, ke tiuj senlaboraj personoj refoje akiris "feran bovlon". Kiuj dumlonge ne estis postenigitaj aŭ malbone laboras post denova surpostenigo, tiuj ricevos nur monon por minimuma vivtenado aŭ estos eksigitaj.

La avantaĝa regroupigo faris reformon ankaŭ al la salajra sistemo ellaborita laŭ la universala normo de la ŝtato. La Pekina Dua Aŭtofabriko praktikis en la reformado strukturan salajrosistemon, nome fari en 12 klasojn la salajrojn de administrantoj, teknikistoj, politikaj laborantoj kaj laboristoj, doni pagojn konformajn al la respekti-

vaj laboroj. Por stabiligi la frontan produktadon, la fabriko decidis, ke la postena salajro de rektaj produktantoj estu pli alta ol tiu de la nerektaj produktantoj, kaj grandigis la diferencojn de diversgradaj premioj por stimuli la personarojn al konkuro de produktado.

Reformo en salajra sistemo farigis baskulo por stimuli la aktivecon en produktado. Antaŭe oni ne ŝatis labori sur la fronto pro la granda laborintenseco. Sed nun oni memvole iras al la fronto. 35-jara He Jiali estis gardisto de tenejo. En la avantaĝa regroupigo li memvole iris al la fronto de pregado. Li diris: "Antaŭe oni malrespektis la frontan laboron, sed nun oni alte taksas la frontan produktadon per malsamaj pagoj. Mi volas labori sur la ŝatata posteno, dum mi estas juna."

La reformaj rimedoj de la avantaĝa regroupigo alportis novan

energion al la ĉinaj entreprenoj. Statistiko de la Ŝtata Statistika Buroo raportas, ke post praktiko de avantaĝa regroupigo, la produktiveco de la tuta personaro de la ŝtataj industriaj entreprenoj en la unua duono de 1988 altiĝis je 8.8% kompare kun tiu en la sama periodo de 1987, dum la totala nombro de la tuta personaro de la lando reduktiĝis je 390 mil homoj.

Sed pro la praktiko de la avantaĝa regroupigo en pli kaj pli vasta sfero, senĉese kreskas la armeo de superflujaj personoj por la entreprenoj. Fakuloj taksis, ke post ĝenerala praktiko de la avantaĝa regroupigo en la tuta lando, aperos pli ol 10 milionoj da superflujaj personoj, kaj tiam la formo de la avantaĝa regroupigo frontos novan problemon — plej rapide transigi la superflujajn personojn de la entreprenoj al la socia merkato de laborfortoj.

PEZAJ BAZARKORBOJ

Teksto kaj fotoj de WEI LIAO

EN la urbo Ŝanhajo mi tuŝis la plej senteman paroltemon de la loĝantoj.

Aŭtune de la pasinta jaro, en la kvartalo Waitan, mi babilis kun kelkaj urbanoj. Kiam ni parolis pri la rilatoj inter la prez-reformo kaj la bazarkorboj, preterpasantoj haltis unu post alia kaj partoprenis en nia interbabilo. Baldaŭ mi dronis

en tiel fortaj plendoj, kvazaŭ la aĵoj en iliaj bazarkorboj kariĝis pro mi!

La prez-reformo de Ĉinio estas en sia deka jaro. De 1984 Ĉinio eniris en la periodon de plenamplaksa reformo de la prezoj, kiu temas ĉefe pri: unue, grandmezura altigo de prezoj de agrikulturaj produktaĵoj; due, grandmezura

altigo de prezoj de energio, kruĉaj materialoj kaj aliaj fundamentaj produktaĵoj; kaj trie, ĝenerala transdono de prez-decida povo al bazaj instancoj.

Antaŭe la ŝtato "kaŝe" subvenciiis finance vend-departementojn de porkaĵo, ovoj kaj aliaj manĝaĵoj. En la mezo de la pasinta majo ekpraktikiĝis la "malkaŝa" subven-

Prezoj de la bazaro estas tre interesa paroltemo por dommastrinoj.






En bazaru

Kion aĉeti?

Fiŝo estas tre ŝatata plado, famen la prezo hezigitas aĉeton.



cio, t.e. la ŝtato monate donas ĉ. 10 juanojn al ĉiu salajrulo. Konforme al tio oni altigis prezojn de ĉefaj manĝaĵoj. Ekzemple, la prezo de unu kilogramo da porkoviando altiĝis de ĉ. 4 al ĉ. 7 juanoj.

La celo de la prez-reformo estas raciigi la rilatojn inter prezoj de diversaj produktaĵoj por akceli produktadon, vigligi komercaĵan cirkuladon kaj plibonigi la vivon de la popolo. Certa altiĝo de prezo, kiu estas neevitebla en la reformo, iagrade influas la vivon de urbanoj. En sia parolado lastmaje Tian Jiyun (Tjan Ĝijun), vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, montris, ke plejparto de la popolo vivas pli bone ol antaŭe, sed ĉirkaŭ dudek elcentoj de la salajruloj vivas ne pli bone, aŭ eĉ malpli bone ol antaŭe. Li konfesis, ke en Ĉinio ekzistas inflacio, tamen ĝi ankoraŭ ne estas nebri-debla.

Komence de la pasinta septembro leviĝis alta tajdo de aĉetado: iu virino aĉetis por sia kvin-jara filino diversmezurajn ŝuojn, kiuj sufiĉas por uzo de la filino ĝis ŝia edziniĝo; iu familio el kvin membroj aĉetis centojn da kilogramoj da salo, kiuj sufiĉas por uzo de la familio dum dekoj da jaroj!

Tamen la prez-altiĝo de manĝaĵoj plej forte maltrankviligas la urbanojn. Eĉ plej granda malvarmigujlo povas teni manĝaĵojn nur por kelkaj semajnoj. Tial oni povas nur rezignacie akcepti la prez-altiĝon.

Laŭ ĵurnaloj de Pekino, pekianoj kun la koro plena de kontraŭdiroj akceptis la prez-altiĝon de kvarspecaj manĝaĵoj en la pasinta majo. En la tago de ekpraktikiĝo de novaj prezoj la merkato de Pekino estis kvieta.

Loĝantoj de Kantono pli bone eltenas la prez-altiĝon eble pro tio, ke tiu urbo plej frue malfermiĝis al la ekstera mondo. Kelkaj kantonoj diris: "Ni ne timas prez-



Peza bazarkorbo

fluktuon, nur se ĉio estas aĉetebla."

Ŝanhajanoj ŝajne havas malpli fortan nervon. Mi vizitis la urbon en la pasinta septembro, kvar monatojn post la ekpraktikiĝo de novaj prezoj, tamen tiam mi ankoraŭ povis aŭdi plendojn ĉie en bazaroj.

Ŝanhajanoj estas kalkulemaj kaj saĝaj. Tio plene montriĝis en legomaĉetado. Foje mi vidis, ke mezaĝulo en eleganta kostumo disputadis kun vendisto de zingibro, ĉar la lasta donis al li zingibron je 10 gramoj malpli pezan ol la postulata! Estas kompreneble, ke multas ĉe tiuj kalkulemaj urbanoj plendoj pri altiĝo de prezoj.

Aliafoje mi vizitis foiron en Fuzhou-strato. La foiro fermiĝas je la 8-a ĉiumatene. En urĝaj kriadoj de administrantoj por fermi la foiron, la vendistoj konkure ofertas siajn varojn je malaltigitaj prezoj, por kiel eble plej baldaŭ forvendi ilin. Tiam mi vidis maljunulon kun cigaredo inter la lipoj veni en la foiron. Li je prezo de 5.6 juanoj por ĉiu kilogramo aĉetis du

karasojn, kiuj vendiĝis je 8 juanoj ĉiukilogramo en la unuaj horoj de la foiro. Mi intervjuis lin. Lia familia nomo estas Du. Li estas emerito. Li kaj lia edzino sin vivtenas per pensio de 200 juanoj monate. Ili devas pagi 140 juanojn por aĉeti legomojn. Ili apartenas al tiuj urbanoj, kies vivnivelo malleviĝis. Li diris al mi iom ĉagrene: "Ni estas jam maljunaj kaj devas esti bone nutritaj. Sed mia enspezo tion ne permesas. Kion fari? Mi povas nur rondiri en la foiro je la 8-a ĉiutage, por aĉeti iom da malmultekostaĵoj."

Multaj Ŝanhajanoj bonvenigas la reformon pri prezoj kaj salajro. En bazaro de Jiaozhou-strato 30-jara viro aĉetis nigran karpegon vivan per 20 juanoj por festi la naskotagon de sia dujara filino. La viro estas ordinara laboristo de la Ŝtala Kompanio de Baoshan (Baŭŝan), Ŝanhajo. Lia baza salajro estas naŭdek-kelkaj juanoj ĉiumonate. Krome li ricevis diversajn subvenciojn kaj monpremion. Tiel li ricevis sume ĉ. 200 juanojn ĉiu-



En ŝtata bazaro oni ne trompas klientojn.

monate, kaj lia edzino pli ol 100 juanojn. Tiu familio el 3 anoj vivas bone. "La reformoj favoras min," diris li, "antaŭ dek jaroj mia salajro estis nur tridekkelkaj juanoj. Kvankam tiam la prezoj estis malfaltaj, mi tamen ne povis aĉeti tian karpon."

Por diri sincere, la plejparto de ĉinaj mensaj laborantoj vivas ankoraŭ ne sufiĉe bone. En bazaro de Ningbo-strato mi vidis mezaĝan viron kaj junan virinon kun korboj. En kia kontrasto estas iliaj korboj! En la korbo de la viro troviĝis nur kelkaj malkaraj zizani-tigoj, dum tiu de la virino estis enhavoriĉa: angiloj, bovviando, kraboj kaj multaj freŝaj legomoj. Demandinte mi informiĝis, ke la viro estas inĝeniero en iu instituto, dum la virino estas laboristino en radio-

fabriko multe profitanta.

Ĉu oni plendas ĉu aprobas, senĉesa altiĝo de prezoj jam estas neŝanĝebla realaĵo. Plimulto de la loĝantoj devas akomodi sin kontraŭvole al la situacio. En la plej granda ŝtata bazaro Sanjiaodi mi informiĝis, ke de junio ĝis aŭgusto, 1988, tie oni vendis 480 000 kg. da porkoviando, nome, je 100 000 kg. malpli multe ol en la sama periodo de 1987; dume tie vendiĝis 100 000 kortobirdoj je 60 000 pli multe ol en la sama periodo de 1987, ĉar la prezoj de kortobirdoj ne altiĝis.


Ĉinio sin trovas en evolutempo, kiam pokapa enspezo kresku de 400 al 1000 usonaj dolaroj. Tiun periodon fakuloj nomas "periodo de drasta ŝanĝiĝo de ekonomia mekanismo". En tiu periodo, certagrada leviĝo de prezoj estas neevi-

tebla.

Tamen la skalo de prez-altiĝo ne povas superi limon de la ekonomia kaj psikologia elteno de la popolo. Lastatempe mi informiĝis, ke la ĉina registaro estas ellaboranta politikon por bremsi inflacion kaj prez-leviĝon, kaj por batali kontraŭ komercistaĉoj, kiuj ŝakras kun apogo de iuj registaraj instancoj aŭ personoj.

Oni profetas, ke post dekoj da jaroj, kiam historiistoj traktos tiun ĉi tempon, ili eble diros: "La ĉinoj vivintaj en la lastaj dudek jaroj de la 20-a jarcento estis generacio tre malfacila, ĉar ili travivis la reformon de prezoj — la plej malfacilan trapasejon sur la vojo al bonhaveco de la ĉina nacio."

Marĉando




Reveno kun plena bazarkorbo



LEGENDO DE HEĜE-NACIECO

Ksilografajo de HE JIN'AN

Heĝe-nacieco estas la unika ĉina norda nacimalplimulto, kiu sin okupas pri fiŝkaptado kaj ĉasado kaj uzas hundan sledon. La ksilografajo prezentas fiŝkaptadon kaj ĉasadon de heĝe-oj.





SCIENC-ESPLORA STACIO SUR STEPO

Teksto de CAO BAILONG
Fotoj de LIU SIGONG

Ekperimenta priklo

STERNIĜAS la vasta stepo Xilinguole (Ŝjilinguole) en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, norda Ĉinio. En 1979 la Ĉina Akademio de Sciencoj, Universitato de Interna Mongolio kaj aliaj organizoj fondis sur la stepo la unuan ĉinan herbejan ekologi-sisteman esplor-stacion.

Dislokiĝas stepoj de la Nordorienta Ebenaĵo ĝis la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, de la montregiono de Hainan-insulo ĝis la marbordo de la Flava Maro, kun areo de pli ol 300 milionoj da hektaroj, kiu konsistigas 1/3 de la totala areo de Ĉinio. La stepo Xilinguole, abunda je specioj de kreskaĵoj, kun bone konservata natura fizionomio, estas tipa ne nur en la mezvarma stepa regiono de Ĉinio, sed ankaŭ en la stepa zono de Eŭrazio. Ĝi estas ankaŭ la unua protektata herbejo de Ĉinio.

Post la fondiĝo de la stacio, oni starigis tie konstruaĵojn kun areo de 1200 kvadrataj metroj, inkluzive de 24 laboratorioj kun areo de

400 kvadrataj metroj, unu observatorio kaj unu loĝkvartalo. Krome, estas ankaŭ 6 eksperimentaj kampoj. Ĉiujare venas tien ĉ. 50 fakuloj por esplori la strukturon kaj dislokiĝon de la stepa flaŭro, la influon de paŝtado sur brutojn, plantojn kaj grundon, la restarigon kaj plibonigon de degenerinta herbokampo, la enkondukadon de gravaj paŝtherboj kaj ekonomiaj plantoj kaj la preventadon de katastrofoj de musoj kaj lokustoj.

En la lastaj dek jaroj sciencistoj jam aperigis pli ol 150 disertaĵojn, kaj iliaj atingoj vekis la atenton de fakuloj en- kaj eksterlandaj. "Homo kaj Biosfero" de Unesko jam metis en sian planon parton de la objektoj esplorataj de ili. La plano estas ellaborita konsidere la ĉiam pli akrajn problemojn de loĝantaro, greno kaj riĉfontoj en la nuna mondo. Por solvi tiun kontraŭdiron estas necese koni la influon de la homa aktivado kaj ter-uzo sur paŝtejon por prezenti

sciencajn planojn, enhavon kaj rimedojn. Nun 22 landoj partoprenas la esploron, fondis 52 esplorstaciojn sur diversspecaj herbejoj de la mondo kaj komencis relative sisteman esploron.

Pro la malracia paŝtado kaj senbrida ekspluatado de tero la totala areo de la degenerintaj herbejoj de Ĉinio jam konsistigas 30% de ĝia totala herb-areo. Nun post eksperimentado sciencistoj de la stacio resumis efikajn rimedojn plibonigi la degenerintajn herbejojn, kiaj plugado kaj ripozigo de herbokampoj kaj aldono de bonaj herbosemoj, kio havas tre gravan signifon por grandigi la produktan forton de la ĉinaj stepoj.

La stacio havas 27-hektaran eksperimentan kampon. Ĝi alprenas rimedojn de natura fermado, prilaborado de la kampo kaj aldono de herbosemoj. En la 6-jara observado kaj registrado sciencistoj trovis, ke la longo de la ĉefa degenerinta paŝtherbo aneŭrolepido (*Aneurole-*

pidium chinense) kreskis de malpli ol 10 cm. al ĉ. 50 cm. La hektara produktokvanto leviĝis de pli ol 700 kg. al pli ol 1400 kg. La kampo reakiris sian fizionomion.

Sur alia eksperimenta kampo kreskas alia bonspesia paŝtherbo granda stipo, ankaŭ ĝi estas ĉefa paŝtherbo sur Xilinguole-stepo. Tiu paŝtherbo, frostorezista, kreskas en malaltaj lokoj. Sciencistoj de la stacio faras tie esploradon pri la kreskada forto, humideco de grundo, cirkulado de nutraĵoj de grundo kaj mikroboj en grundo. La granda stipo tie kreskanta evidente multe pli prosperas ol tiu

ekster la kampo. Ĝi estas pli longa je ĉ. 20%.

Ankaŭ zoologoj observas kaj esploras en malsamaj eksperimentaj kampoj la bazajn trajtojn kaj dislokiĝon de ronguloj kaj lokustoj.

Post la dekjara peniga laborado sciencistoj jam plenumis esplorojn pri la bazaj trajtoj kaj leĝoj de dislokiĝo de la flaŭro en la baseno de Xilin-rivero kaj la bazaj trajtoj de herbar-tipoj en tiu regiono, akiris dekjarajn materialojn pri la rilatojn inter la stepo kaj medio kaj

trovis 8 speciojn de lokustoj rapide kreskantaj kaj plej damaĝaj al la stepo. Post scienca observado ili jam konis la plant-elekton kaj dislokiĝon de lokustoj, kio povas liveri scienca bazon por antaŭsciigi pri la apero de lokustoj kaj alpreni ekologiajn prevent-rimedojn.


Kun la senĉesa disvolviĝo de la internacia kunlaboro kaj oftigo de la internacia kontakto, de post 1980 ĉ. 50 fakuloj pri stepo, ekologio kaj grundo el Usono, Francio, Svedio, Japanio, Kanado kaj Aŭstralio venis tien por vizito, esploro aŭ kunlaboro en esploro.

Fotosinteza ekzameno sur stepo






Ĉinaj kaj fremdlandaj sciencistoj
en esplorado de parcela flaŭro



Biomasa analizo en laboratorio



La stepo Xijinguole



Grego sur la stepo



Sciencistoj en esplorado de kutimoj de lokustoj en sinnutrado sur la herbejo de granda stipo



Renoviga Kampanjo de Poezio kaj Prozo en la Meza Periodo de la Norda Song-dinastio

de MEI ZHI (Mej Ĝi)

EN la lasta periodo de Tang-dinastio kaj la periodo de la Kvin Dinastioj Ĉinio estis en separatismo kaj ĥaoso, sed tiu fenomeno finiĝis kaj la ŝtato denove unuiĝis en Song-dinastio (960-1279).

Song-dinastio havis du etapojn — la Norda Song (960-1127) kaj la Suda Song (1127-1279). Tiam Ĉinio eniris en alian prosperan periodon de sia literatura historio. La renoviga kampanjo de poezio kaj prozo gvidata de Ouyang Xiu (Oŭjang Ŝiŭ) en la meza periodo de la Norda Song-dinastio multe akcelis la literaturan disvolviĝon de Song-dinastio. En la literaturaj rondoj sinsekve aperis Wang Anŝi, Su Ŝi, Li Qingzhao, Xin Qiji, Lu You kaj aliaj eminentaj literaturistoj, kiuj verkis multajn prozaĵojn, poemojn kaj ci-ojn. El ĉi tiuj la ci-oj estis la plej elstara atingo de la Song-dinastia literaturo kaj atingis sian kulminon.

Ouyang Xiu (1007-1072) estis gvidanto de la literaturaj rondoj de la Norda Song-dinastio kaj ankaŭ grava politikisto tiutempe. Li persistis en politika reformo en la juneco kaj fariĝis konservativa en siaj lastaj jaroj.

En la unua etapo post la fondiĝo de Song-dinastio, por flati la regantojn pri ilia regado iuj servilaj literaturistoj strebis al metrika harmonio kaj

Ouyang Xiu



pompeco de ci-oj, kio akcelis la dekadencan kaj bombastan stilon de la malfrua periodo de Tang-dinastio kaj la Kvin Dinastioj kaj formis literaturan skolon “Xikun” kun trajto de tia stilo. Tiam iuj literaturistoj venintaj el la meza kaj malsupra socitavoloj intencis ŝanĝi la situacion kaj donis al ĝi certagradan baton. Ĝis la meza periodo de la Norda Song-dinastio, Ouyang Xiu kaj aliaj literaturistoj disvolvis plu la renovigan kampanjon kaj penis restarigi la tradicion de la klasika prozo de Han Yu (768-824) kaj Liu Zongyuan (773-819). Ili emfazis, ke la verkoj devas speguli la realan vivon kaj servi al la reala politiko, la stilo devas esti modesta, simpla, klara kaj facile komprenebla. Ouyang Xiu kaj liaj kolegoj formis forton, fine venkis la stilon “Xikun” kaj fariĝis la ĉefa literatura skolo de la Norda Song-dinastio.

Per diversstilaj artikoloj Ouyang Xiu praktikis sian literaturan vidpunkton. Liaj prozaĵoj ĉu komentariaj ĉu rakontaj estis koncizaj, konvinkaj kaj vivecaj. Liaj politikaj komentarioj “Pri Koterio” kaj “Pri la Biografio de Muzika Oficisto en la Kvin Dinastioj” admonis, ke la imperiestro promociu eminentulojn kaj eksigu maliculojn, kaj komentariis, ke “pripri zorgo kaj diligenta laboro povas prosperigi la ŝtaton kaj komforto estas danĝera eĉ por la vivo de la imperiestro mem”. Pri tio li faris ripetitan kaj konvinkan argumenton. Liaj beletraĵaj eseoj “Pavilono Ebria Oldulo”, “Aŭtunaj Sonoj”, “Kiosko Fengle” k. a. en lakonaj priskriboj forte elspiris lirikecon. Inter ili troviĝas nemalmultaj brilaj paragrafoj pri persono, okazaĵo kaj pejzaĝo. La unua priskribas matenan kaj vesperan pejzaĝojn de la montoj en Chuŝhou, pejzaĝojn en ĉiuj sezonoj kaj lian ekskurson al tiu loko, kun klara strukturo en flua lingvo. “Aŭtunaj Sonoj” figure priskribas aŭtunajn sonojn. Legante ĝin, oni kvazaŭ persone aŭdas la sonojn.

Ouyang Xiu estis ankaŭ poeto. Kvankam liaj poemoj ne atingis tiel altan nivelon kiel liaj prozaĵoj, tamen estas admirindaj. Ekz., lia poemo “Feĉomanĝantoj” malkaŝis la tiaman malluman socion. Ŝtataj oficistoj uzis rekviziciitan grenon por vinfarado, sed al kamparanoj “mankas mili-kaĉo en kaldrono” por vivtenado” kaj ili devas “alveni por aĉeti l’

feĉon ĉe l' oficistoj". Liaj aliaj lirikaj kaj pejzaĝaj poemoj, kiaj "Nokta Ŝiphalto ĉe Yueyang", "Ŝerca Respondo al Yuanzhen", "Al Xie Facao, Sendita Printempe ĉe la Okcidenta Lago" kaj "Nokta Ŝiphalto ĉe Huangxi", estis modestaj, belaj, intimaj kaj kortuŝaj. Ouyang Xiu verkis ankaŭ multajn ci-ojn. "Taŝaŝing" estis unu el liaj reprezentaj verkoj. Ĝi komparis malĝojon kun printempa rivero kaj prezentis bildon de malproksimaj montoj. Ĝi forte impresas la legantojn per sia arta efekto. Liaj ci-oj priskribantaj pejzaĝojn estas klaraj kaj delikataj, tial deklami ilin estas granda ĝuo.

Wang Anshi (1021-1086) estis fama politikisto en la historio de Ĉinio. Jam en sia aĝo de pli ol 20 jaroj li plurfoje skribis al siaj superuloj por plibonigi ŝtatajn aferojn. Post sia surtroniĝo en 1068 la imperiestro Shenzong nomumis lin ĉefministro. Ĉi tiu komencis sian faman politikan reformadon. Li firme staris por forigi la malriĉecon kaj malfortecon de la socio kaj limigi la privilegion de grandaj burokratoj, bienuloj kaj komercistoj. Li ellaboris serion da novaj leĝoj por malpezigi la ŝarĝon de la popolo kaj akceli la disvolviĝon de la produktado. Sed liaj novaj leĝoj renkontis oponon de la malnovaj burokratoj en la reganta kliko kaj post nelonge estis abolitaj. Li malsaniĝis de malĝojo kaj indigno kaj baldaŭ mortis.

Wang Anshi estis ankaŭ elstara literaturisto. Liaj verkoj servis al lia politika idealo. Efektive, liaj politikaj komentarioj kaj tezoj ne estis literaturaj verkoj, tamen ili odoris fortan realecon kaj estis strukture rigoraj, rezone konvinkaj, lingve simplaj kaj modestaj kaj resume koncizaj. Ili estis rigardataj de posteuloj kiel modelaj politikaj komentarioj. Ankaŭ liaj eseoj, akrevidaj kaj sentoplenaj, montris lian rezolutan stilon de politikisto. Tial liaj prozaĵoj ludis pozitivan rolon en firmigo de la atingo de la renoviga kampanjo de klasika prozo de la Norda Song-dinastio. Estas nesubtaksebla lia nereakta influo en la ĉina proza historio.

La atingo de Wang Anshi en poezio superis lian atingon en prozo. Liaj poemoj estas enhavoriĉaj kaj havas fortan efekton de arto. Liaj poemoj "Impreso je Okazo", "Aneksado", "Ŝparo de Militaj Fortoj" spegulis la realan vivon de Song-dinastio en politiko, ekonomio kaj militaj aferoj kaj montris lian prizorgon al la popola vivo kaj lian idealon pri reformado de malbonaj politikoj. En siaj poemoj li prezentis siajn politikan idealon kaj kritikan spiriton per komentario pri la rolo de historiaj personoj. La poemoduo "Pri Belulino Wang Zhaojun"¹, la plej fama el liaj poemoj, delikate priskribas personojn per kortuŝaj versoj, prezentante lian mornan afliktiĝon:

*"Ĉu vi ja ne vidis Ajao-o² ŝlosita en domo
Fatalo nun neeviteblas ĉu sude ĉu norde!"*

Eksigite je la ĉefministra ofico, Wang Anshi



Wang Anshi

verkis multajn pejzaĝajn poemojn. Iuj el ili sukcese prezentis la belon de la naturo kaj atingis altan nivelon en arto. Ekz., la poemoj "Sur la Rivero", "Skribo sur Muro de Sinjoro Huyin" kaj "Ŝiphalto ĉe Guazhou" estis tre eminentaj.

En la meza periodo de la Norda Song-dinastio aperis ci-isto Liu Yong (987?-1053), iniciatema ĉu enhave ĉu arte en siaj verkoj. Li malsukcesis plurfoje en la ŝtata ekzameno, rigardis tion sensignifa kaj sin tenis malserioze al la vivo. Li estis inter kantistoj kaj dancistoj dum sia tuta vivo kaj verkis multon por kantistinoj. Li estis la unua literaturisto de la Norda Song-dinastio, kiu sin dediĉis al ci-verkado. Li verkis multajn longajn ci-ojn, kiuj liveris taŭgan formon por grandigi la enhavon de ci-oj, kaj per tio li faris grandan kontribuon al la disvolviĝo de ci-oj.

Ekde la Kvin Dinastioj ci-oj ĉiam prezentis amaferon, sed Liu Yong komencis ŝanĝi ilian temon. Krom priskribi virinojn, liaj ci-oj prezentis ankaŭ vagabondan vivon de militistoj kaj vojaĝantoj kaj urban prosperon. Lia fama ci-o "Yulinling" estis verko pri vagabondo. Ĝi diras:

*"Post mi kuŝas en nebulo akvovojo de mil' lioj³,
En vespero vastas la ĉielo, etendiĝas l' akvo."
"Kio vekis min de ebriiĝo en ĉi nokto?
Jen salikoj, vento en mateno, luna arko."*

La versoj bildigis la mornan senton kaj pejzaĝon por prezenti la animstaton de la verkisto.

1. Wang Zhaojun (Ŭang Ĝaŭĝjun) estis belega knabino en la palaco de la Okcidenta Han-dinastio. Ĉar ŝi rifuzis smiri la manon de la palaca portretisto, li ne prezentis al la imperiestro la veran belecon sur ŝia portreto. Ne favorate de la imperiestro, ŝi volonte edziniĝis al la huno ĉefo Huhanya. Pri tiu historio legu "5000 jaroj de Ĉinio" eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo.
2. Ajao (Aĝjau) estis edzino de imperiestro Udi de Han-dinastio. Komence ŝi estis drolotata de la suvereno, sed poste perdis lian favoron. Ŝi estis eksigita je la imperiestredzineco kaj ŝlosita en izolita domo.
3. Li-o — ĉina mezurunuo, kiu egalas al duonkilometro.

EL VERKOJ DE OUYANG XIU KAJ WANG ANSHI

Aŭtunaj sonoj (fragmento)

de OUYANG XIU

Legante en nokto, mi aŭdis sonojn el la sudokcidento kaj surprizite ilin aŭskultis kun atento. "Strange!" mi miris. Ili susuris kaj murmuris en la komenco, sed subite saltis al potenco kiel impeta torento kun tumultaj ondoj en nokta silento, aŭ ŝtormo atakanta ekster la atendo kaj je ilia frapado tintis metaloj; ili similis al trupoj marŝantaj al batalo, sen paroloj, sen ordonoj, nur kun paŝbruoj de la homoj kaj ĉevaloj. Mi demandis mian servoknabon: "Kio tiel bruas? Eliru por rigardo." Sed li diris: "La lun' kaj steloj brilas hele, lumas la Arĝenta Rivero* sur la ĉielo, nenie voĉas la najbaroj, la sonoj venas el la arbaroj."



Laŭ la melodio "Taŝaŝing"

de OUYANG XIU

*Umeaj floroj velkis ĉe l' hotelo,
Salikaj vergoj sveltas ĉe l' rivero.
Aromas herboj, varmas vento, dancas bridrimeno.
Mi pli kaj pli foriĝas kaj kreskadas la ĉagreno,
Simila al la flu' senfina en la primavero.*

*El ŝia delikata kor' anĝela,
Jen larmoj lirlas tra la vango bela.
Ne sin apogu al balkona balustrad' danĝera!...
Ekstreme de l' ebena verda kuŝas montoĉeno
Kaj trans la ĉeno iras nun la vojaĝant' mizera.*

Mi pli kaj pli foriĝas kaj kreskadas la ĉagreno...

Sur la rivero

de WANG ANSHI

*Aŭtuno. Duonsireniĝis super la rivero,
Pluvnuboj heziteme klinas sin en la vespero.
La bluj montoj en nebulo baras mian vojon —
Subite sin malkaŝas ŝipoj multaj, vel' post velo.*

Elĉinigiŝ LAŬLUM

* Arĝenta Rivero — nomo de la Lakta Vojo laŭ ĉina mitologio.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30. da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la

plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* S-ro Xie Shaoxing, 30-j., kolektas E-ajojn inkluzive de filatelaĵo, glumarko, alumet-etiketo, insigno, bildkarto por E-ekspozicio. Bonvenaj estos viaj kunlaboro kaj helpo. Adr.: Kang Le Li 24-201, Di Dong Qu, Jiangmen 529051, Guangdong. Ĉinio.

* Dez.kor. kun geesperantistoj tm. pri ĉiuj temoj. Certe respondos.

Adr.: Du Zhengjiu, P.O. Kesto 7965, Xuanhan, Sichuan, Ĉinio.

*E-instruisto dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: S-ro Liu Baoguo, Anhui Yin Ran Chang, He Ping Lu 4 Hao, Hefei, Anhui, Ĉinio.

* S-ano Ma Zhiyong, 29-j., dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj kun gesanoj de ĉiuj aĝoj kaj interŝ. pm., bk. kc. Certe respondos. Adr.: Zhong Shu Jie 46, Yichang, Hubei, Ĉinio.

Bildrakontoj de Ĉina Esperanto-Eldonejo



Songô de Ĝenĝen

Teksto kaj bildoj de Mej Jing, tradukita de Ŭang Ŝijong 46p. 18.4 × 17.2 cm. 88-Es-193P US\$1,70 £0,80

Knabino Ĝenĝen estas tro elektema en manĝado kaj manĝas tre malmulte. Ŝi ofte manĝigas animaletojn per bongustaj manĝaĵoj, kiujn la patrino preparis speciale por ŝi. Iun tagon Ĝenĝen havis strangan songon, en ĝi ŝi fariĝis tre tre malgranda, ke ŝi povas eĉ rajdi sur la dorso de libelo. Kune kun la libelo Ĝenĝen venis en insektan mondon... Ĉu vi volas scii, kian sperton ŝi havis? Legu la libron.

Magia Peniko

Adaptita de Han Ŝing, Pentrita de Li Ŝiĝji, Tradukita de Ĝjang Hongĝang. 40p. 18.5 × 21 cm. 88-Es-178P US\$1,30 £0,65

Ma Ljang estis malriĉa sed tre bonkora knabo. Li tre ŝatis pentri, sed li ne havis monon por aĉeti penikon. Tamen li diligente lernis ĉiutage. Li desegnis bildojn per vergo aŭ lignokarbo. Lia diligenteco kortuŝis feon, kiu donacis al li magian penikon. Ĉio pentrita per ĝi povas fariĝi vera. Per la peniko Ma Ljang helpis la malriĉulojn kaj punis la avidajn riĉulojn.

Kun ĉarmaj bildoj, facile komprenebla teksto, la libro estas bona legaĵo taŭga por infanoj aŭ komencantoj.

Transiro de Ponto

Bildrakontoj de Le Ŝjaŭjing 20p. 18 × 20 cm. 88-Es-305P US\$1,10 £0,56

En ĝi kolektiĝas 18 grupoj da karikaturaj pri infana vivo, pentritaj de konata ĉina karikaturisto Le Ŝjaŭjing. Plena de humuro ĝi alportos al vi elkoran ridon kaj ĝojon.

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPC

aŭ Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Bejĝing, Ĉinio

LIBREJO SANWEI



Gesinjoroj Li Shiqiang kaj Liu Yuansheng

KONTRAŬ la Kultura Palaco de Nacimalplimulto en Pekino estas librejo Sanwei posedata de iu geedza paro. La por-do estas ornamita per gravuritaj drakoj, kaj la interna dekoro portas antikvan guston. En la ĉambro regas agrabla kvieto. Afabla servo disfamis la librejon kaj altiris al ĝi multajn homojn.

Efektive la librejo estas ne-granda oblonga ĉambro por librovendado. Ĉirkaŭe en la ĉambro staras vicoj da bretaroj kun libroj pri sociaj sciencoj, kulturo, literaturo kaj arto klasitaj laŭ eldonejoj, inter kiuj estas la famaj Komerca Presejo kaj Popola Eldonejo.

Mastrino de la librejo Liu Yuansheng diris al mi: "Ni aran-

ĝis la librejon tiel, ke oni, enpaŝinte, tuj sentu sin kvazaŭ en sia propra legoĉambro, sentu kvieton, komforton kaj oportunon, sed ne ricevu impreson de butikoj." La librejo servas de la 9-a horo matene ĝis la 23-a. Post la 23-a oni povas sonorigi por eniri. Ĉiuj librobretaroj estas apertaj, ke la vizitantoj povu foliumi ĉiun ajn libron.

Mi rimarkis, ke ĉiuj vendistoj estas afablaj. Se al la librejo mankas libro, kiun vi volas, la vendistoj ĉiamaniere trovos ĝin por vi. La vendistoj estas studentoj propravole venintaj por servi. Tiuj kleruloj estas ĉiam pretaj por respondi al la vizitantoj. Ili scias la enhavon de la libroj kaj konas la deziron de la vizitantoj, tial ili estas tre plaĉaj al la vizitantoj, kiuj

venas al la librejo ne nur por aĉeti aŭ mendi librojn, sed ankaŭ por fari socian enketon. Ili diris, ke la librejo estas esence kultura salono.

La mezaĝa mastro de la librejo Li Shiqiang estas introvertito neparolema, sed diligenta; dum lia edzino malkaŝema kaj parolema. Ambaŭ iris malglatan vojon en la vivo, tial ili tre domaĝas la nunan situacion kaj faris decidon plene disvolvi sian talenton en la kariero. Demandite pri la motivo por entrepreni librokomercon, Liu Yuansheng respondis: "Unue ni bone konas, ke unu el la kialoj de la postiginteco de Ĉinio estas la malalta klereco de la publiko, dum libroj estas grava instrumento por altigi la klerecon. Due, multaj el la librejoj ĉasas nur profiton, kaj la publiko ne ŝatas ilin. Trie, en nia lando, precipe en la nordaj provincoj, komercisto-privatuloj estas malestimataj de la socio, kaj ni volas ŝanĝi la impreson pri ni komercisto-privatuloj."

Ili renkontis multajn malfacilojn en la starigo de la librejo, ĉar ili ne havis monon. Kontraŭ la tuta havaĵo kaj prunteprenoj ili aĉetis kadukan domon. Por riparado de la domo ili elspezis ĝis la lasta cendo. Por ŝpari monon, anstataŭ dungi konstruistojn, ili mem faris la riparadon helpe de siaj fratoj. Krom tio, ili ankaŭ devis multe klopodi por akiri legitimadon al la fondo de ilia librejo. Ili sentis ĝojon, ke nenies manoj ili ŝmiris. Ilia sinoferemo al la kultura afero de la patrio emociis la koncernajn kulturajn departementojn kaj multajn eldonejojn, ilia peto pri la fondo estis baldaŭ sankciita, kaj pli ol 20

eldonejoj akceptis ilin kiel perantojn. Multaj eminentuloj kaj famuloj de la kultura rondo donacis al la librejo kaligrafiaĵojn, pentraĵojn kaj librojn kaj ĉeestis ĝian inaŭguron en la 18-a de majo 1988.

La mastrino senkaŝe diris al mi: "Ni, komercisto-privatuloj, sendube celas gajni profiton, profiton grandan. Laŭ takso, en malpli ol unu kaj duona jaroj ni povos kovri la ŝuldon de dekoj da miloj da juanoj. Sed ni ne profitos per malhonestaj rimedoj. Se ni vendus pornografiajn librojn por riĉigi nin, tio malkonformas al la principo de nia servo."

La librejo renkontis diversajn malfacilojn en sia funkciado. Ekzemple grandskala konstruado antaŭ la librejo baris al ĝi la vojon. Do la vendistoj servas surstrate. Iu fremdlanda ĵurnalisto raportis, ke la librejo alfrontas bankroton. Tiun antaŭdiron la mastroj tute ignoris, ĉar ili neniam pensis pri bankroto. Ili venkis ĉiujn malfacilojn per la forta volo.

Usona aŭtoro subskribas siajn verkojn.



En la librejo

Ĉe la adiaŭo Li Shiqiang kaj Liu Yuansheng diris al mi en plena memfido: "Estonte nia librejo entreprenos ne nur librovendadon.

Ĝi disvolvos sin al centro de eldonado. Certe aperos antaŭ ni malfaciloj, sed ni trovos kontraŭrimedojn, nur se ni konsideros oportunecon por la legantoj."



REFOJE PRI TRANSSKRIBO DE ĈINAJ PROPRAJ NOMOJ

de la Redakcio

LA latinigita transskribo de la ĉinaj propraj nomoj estis diversmaniera. Ĝi estis malsama en la lingvoj angla, franca, germana kaj hispana. Eĉ en sama lingvo sama propra nomo estis transskribita en pluraj manieroj. Tion kaŭzis manko de aŭtoritata, legalizita kaj oficiala sistemo por latinigita transskribo de la ĉinaj propraj nomoj siatempe.

Aŭguste de 1977 la ĉina delegacio ĉeestis la 3-an simpozion pri normaligo de la lokaj nomoj okazigitan de UN en Ateno. La simpozio aprobis proponon de la ĉina delegacio preni la projekton de han-lingva fonetika alfabeto kiel la internacian normon pri latinigita transskribo de la ĉinaj loknomoj. Poste la ĉina registaro decidis, ke ĉiuj eldonadoj kaj diplomaciaj dokumentoj en diversaj lingvoj de latinaj literoj senescepte prenu la projekton de han-lingva fonetika alfabeto en transskribo de la ĉinaj propraj nomoj por elimini la longtempan haoson tiuflankan. Dank' al iom-post-ioma disvastiĝo de la projekto de han-lingva fonetika alfabeto internacie, nun ĝi jam fariĝis internacie aprobita projekto por transskribo de la ĉinaj propraj nomoj. Ĝi fariĝis preskaŭ la unika instruilo en la han-lingva instruado. La ĵurnaloj kaj revuoj presitaj en latinaj literoj de la tuta mondo preskaŭ senescepte aplikis tiun projekton en la transskribo de la ĉinaj propraj nomoj.

En tiu problemo nia redakcio hezitis en longa tempo. Parto de niaj legantoj deziris, ke EPĈ prenu la Esperantan alfabeton en transskribo de la ĉinaj propraj no-

moj, ĉar ili ne sciis kiel prononci iujn liter-kombinojn en la han-lingva fonetika alfabeto. De la maja numero de 1984 ni kontentigis ilian deziron. Sed fakte, tiu Esperanta transskribo estis ne tute preciza kaj iafoje estis multe diferenca de la han-lingva prononco. Ekz. antaŭe ni prenis Esperantan ĝ por anstataŭi la han-lingvan *zh*, tio estis ne tute ĝusta. Kaj krome, dank' al la popularigo de la projekto de han-lingva fonetika alfabeto, ĉiuj fremdlingvaj eldonadoj de Ĉinio en latinaj literoj jam uzas la projekton de han-lingva fonetika alfabeto en la transskribo de la ĉinaj propraj nomoj. Ĝin uzas ankaŭ la ĉinaj flughavenoj, fervojaj stacioj, havenoj, hoteloj, poŝto kaj telegrafio. Tio diferencis de la Esperanta transskriba sistemo uzita de nia redakcio, tial niaj legantoj kaj samideanoj vojaĝantaj al Ĉinio ofte konfuziĝis de tio.

Post plurfoja pripenso, ni decidis, de januara numero, 1989, denove preni la han-lingvan foneti-

kan alfabeton en transskribo de la ĉinaj propraj nomoj. Tio utilas al la unueco de la ĉinaj propraj nomoj en latinigita transskribo kaj elimino de miskompreno kaj sekve ne plu aperos la fenomeno supermenciita en nia revuo. Koncerne la malfacilojn en la prononco kaj iujn nekutimaĵojn al alilandaj legantoj, ni iagrade solvos ilin. Se estos necese, ni donos Esperantan noton en krampoj, publikigos la komparan tabelon de interrespondaj literoj de la han-lingva fonetika alfabeto, internacia fonetika alfabeto kaj Esperanto. Koncerne la Esperantan transskribon ni uzos la malnovan projekton uzitan de nia revuo en la pasintaj jaroj. Ni plu uzos kelkajn Esperantigitajn lokajn nomojn kiaj Pekino, Ŝanhajo, Nankino k.a.

Niaj plurfojaj ŝanĝoj en la transskribo de la ĉinaj propraj nomoj multe ĝenis niajn legantojn, pri tio ni petas vian pardonon kaj esperas ricevi vian aprobon al nia nova ŝanĝo.

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

UTC	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		31.5	9500
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30.4	9860
		26	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
		43.1	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
		19.7	15165

Unu el la Plej Bonaj Originalaj Romanoj

SUR KAMPO GRANITA originala romano de Istvan Nemere, dua eldono, de la Hungara Esperanto-Asocio, 1987. Formato: 13.5 x 20 cm. 127 p. Prezo: 18 gld.

Istvan Nemere jam sufiĉe populariĝis inter la esperantistoj pro la kreskanta serio de liaj originalaj romanoj en Esperanto. Du el liaj romanoj fariĝis "La Verko de la Jaro", kaj la romano "Sur Kampo Granita" unuafoje eldonita en 1983 rikoltis duan eldonon post nur jartrio, kio estas maloftaĵo en Esperantujo.

La rakonto baziĝas sur vera historio pri germana leŭtenanto Matthias Defregger, kiu dum la Dua Mondmilito ordonis pafmortigi multajn kamparanojn en itala montvilaĝo kaj fariĝis katolika pastro post la milito, sed fine estis senmaskigita. La plumo de Nemere ŝanĝis lian nomon je Mar-

tin Dregger kaj lian okupon je altranga oficisto de la Internacia Ruĝa Kruco, kaj li multe laboris por priskribi la travivaĵojn kaj animstaton de Martin, kiu post la senmaskiĝo veturis al la vilaĝo, kie li krimis sub la premo de la militaj cirkonstancoj. Martin klopodis fari bonon dum la postmilitaj jaroj, sed ĉu la bonfaroj povas forgesi la iaman krimon? Jen la ĉefa demando, kiun oni devas respondi.

Etaj Etudoj pri la Vivo

ETAJ RAKONTOJ de Eduardo Novembro, eldonita de la Portugala Esperanto-Asocio. Formato: 12 x 17 cm. 127 p. Prezo ne montrita.

Tiu ĉi kolekto de 16 noveloj, plejparte verkitaj en la portugala kaj poste esperantigitaj de la aŭtoro mem, donas al ni plian signon de la literatura aktivado de portugalaĵ samideanoj. La temoj de la rakontoj montras al ni intereson de la aŭtoro pri problemoj materiaj kaj spiritaj en la socio. La verkinto lerte prezentas al ni artiston ruinigatan de sia luksema edzino, penton de miskonduta amato, karnavalan trompon far ruzulo al naiva knabino, ŝtelistiĝon de senlaborulo, viktimiĝon de infano en aŭtoakcidento, kontraŭdiron inter homo kaj maŝino, amon al la vivo, minacon al la kosmo pro milito ktp. Kvankam ili ne donas al ni ampleksajn bildojn pri la vivo aktuala, tamen la rakontoj helpas la legantojn iom koni facetojn de ĝi.

Post la Dua Mondmilito aperis konsiderinda nombro da Esperantaj verkoj pri la kontraŭfaŝisma batalo kaj la kruelaĵoj faritaj de hitleranoj. "Sur Kampo Granita" estas unu el ili. Preskaŭ duonjarcento jam forpasis de la jaroj teruraj, ĉu estas necese ankoraŭ memorigadi al la homoj la maldolĉojn de tiu tempo? Mi pensas, ke jes, ĉar en nia mondo ankoraŭ ne regas plena paco longdaŭra. Estas utile rerigardi la pasintajn misfarojn kaj elĉerpi lecionojn el la historio. La rapida disvendiĝo de tiu ĉi originala romano Esperanta montris grandan intereson de esperantistoj pri la problemoj kaj neordinaran sukceson de la verko. Kvankam kelkaj malgravaj preseraroj restas en la nova eldono, tamen mi kredas, ke ankaŭ ĝi estos varme akceptata kaj rapide elĉerpiĝos.



Ankaŭ la rakontmaniero plaĉos al certaj legantoj.

Estas bedaŭrinde, ke nombro da gramatikaj eraroj aperis en la tekstoj. Malgraŭ tio mi opinias, ke la eldono de la rakontaro en modestaj vestoj estas pozitiva signo por la portugala Esperantomovado.

Recenzis Laŭlum

●Ĉina gvidanto Zhao Ziyang diris al fremdlanda gasto, ke dank' al la reformado kaj praktiko de la pordmalferma politiko, la ekonomio de Ĉinio tre vigliĝis kaj multe sukcesis en sia disvolviĝo, evidente pliboniĝis la popola vivo, dume okazis ankaŭ iaj malfaciloj, nome kurtaltiĝo, inflacio, putriĝo ĉe kelkaj ĉeneroj en la partiaj kaj registaraj instancoj, egalismo en la distribuo nekomplete forigita kaj novaj maljustaĵoj. Li diris aldone, ke Ĉinio persistos en la reformado kaj pordmalferma politiko, klopodante por solvi tiujn problemojn.

●En la lastaj dek jaroj ĉirkaŭ 1000 grandaj kaj mezgrandaj entrepre-

noj estis finkonstruitaj kaj komencis produktadon, kaj komenciĝis produktado de ĉirkaŭ 2000 solbranĉoj de tiuj entreprenoj.

●De januaro ĝis aŭgusto de 1988 Ĉinio sankciis la establiĝon de 3015 entreprenoj investitaj per koopera kapitalo aŭ solflanka kapitalo de fremdlandaj komercistoj, 206% pli multe ol en la sama periodo de 1987. La aktuala kapitalo atingis 1.312 miliardojn da usonaj dolaroj.


●En la unuaj naŭ monatoj de 1988 Ĉinio produktis 592 lokomotivojn dizelajn, elektrajn kaj vaporajn. La nombro viciĝis nur post tiu de Sov-

etunio en la mondo.

●Nova aŭtovoja ponto super la Flava Rivero kun longo de 530.6 metroj estis inaŭgurita en la nova industria urbo Wuhai de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Ĝi estas la 47-a ponto super la Flava Rivero.

●La unua hidroliza hidroksida motoro naskiĝis en la urbo Shenyang de la Nordoriento de Ĉinio. Tiu maŝino uzas akvon kiel hejtadon kaj taŭgas por diverscipaj aŭto, traktoro, lokomotivo, ŝipo kaj generatoro. Tia motoro ne estigas polucion kaj kreis novan etapon de hidrogen-oksida energio.

La inaŭguro de la sporta kunveno



●La tri nordorientaj provincoj Liaoning, Jilin kaj Heilongjiang, famaj pro la abunda produkto de sojfabo, sorgo kaj maizo, nun fariĝis nova bazo de rizo. Tie oni kulturas rizon sur 1.66 milionoj da hektaroj da tero. Finiĝis la historio de Ĉinio de transportado de greno el la sudaj provincoj al la nordaj.

●La unua nova specio de rizo de la mondo, kiu ne bezonas ĉiujaran selekton, estis prove kulturata en granda areo de Ĉinio kaj montris evidentan efikon. Ĝia meznombra produktokvanto estas pli granda ol tiu de ordinara rizo kaj oni trovis ĝin ege populariginda.

●La 9-an de oktobro de 1988 okazis en Pekino la Unua Tutlanda Sporta Kunveno de Kampanoj de Ĉinio kaj konkursis pli ol 1400 kampanoj el la 30 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj escepte de Taiwan-provinco. La sportistoj konkursis en atletiko, korbopilko, piedpilko, tabloteniso, pafado, biciklado kaj ĉinstila lukto. Krome la sportistoj prezentis wushu-ojn kaj mongolan lukton.

●En la lastaj dek jaroj pli ol 60000 ĉinoj studis kaj studas eksterlande, kaj triono el ili revenis hejmlanden



Docento s-ro Feng Keqin de la matematika fakultato de la Ĉina Scienc-Teknika Universitato revenis post studo en Usono kaj nun laboras kiel vicdekano de tiu fakultato.

kaj ludas gravan rolon sur sia posteno.

●Ĉinio nun havas 116 milionojn da televidiloj, 37-oble pli multe ol en 1978.

●Nun en Ĉinio 90 milionoj da homoj superis la aĝon de 60 jaroj, kaj 3765 el ili superis la aĝon de 100 jaroj.

●En la gubernio Donghai de Jiangsu-provinco 15 kampanoj trovis kristalon 250 kg pezan, kiam ili fosis kvarcojn 19 metrojn sub la tero. En 1958, en tiu gubernio oni trovis "reĝan kristalon" en la pezo de 3.5 tunoj kaj la giganto nun estas eksponata en la Ĉina Geologia Muzeo en Pekino.

●Ekde la mezo de la 60-aj jaroj pli ol 2000 hospitaloj en Ĉinio ekuzis laseron en la fakoj oftalmologia, otorinolaringologia, stomatologia, dermatologia, urinologia, tumorologia, ĥirurgia, pediatria, ginekologia, ostologia k.a. Cent malsanoj oftaj kaj malfacilaj estas kuracataj per lasero. Kelkaj sukcesoj tiuflanke vekis atenton internacie.

●Huzo de Yangzi-rivero estas tre valora fiŝo. La Akvoprodukta Instituto de Chongqing, Sichuan-provinco, bredis kaj generigis huzojn en baseno. En aprilo de 1986 la instituto elkovis 2000 huzidojn kaj nun ili ĉiuj pezas pli ol 5 kg.

Huzo de Yangzi-rivero bredata de la Akvoprodukta Instituto de Chongqing

La 114-jara Wang Derang de Shandong-provinco kaj liaj pranepoj





Koncerto en la hejmo de Zhang Keqin

Foto de WEI LIAO



WEI LIAO:

Arto Floras ĉe Ordinaraĵoj Popolanoj



He Yugen (la unua de maldekstre) konsiliĝas kun siaj amikoj pri la radiko-skulpturo.


Foto de WEI LIAO






Tu Binjie ŝatas fari kaj kolekti modelojn de antikvaj ŝipoj. Foto de YU XINBAO

Yan Hanxiang, kolektanto de alumetaj etiketoj
Foto de YU XINBAO



Horloĝo-kolektanto Wang An'jian
(dekstre) Foto de YU XINBAO



MI iris al la hejmo de He Yugen ĉe la bordo de Suzhou-rivero, kies malpura akvo min deprimis. Enirinte la domon mi tuj vigligis pro la mirinda fenomeno. En la ĉambro de malpli ol 20 m² ĉie staras radiko-skulptaĵoj kaj sur la muroj, tabloj kaj en ŝrankoj kaj apud la lito: aglo fluganta, ŝafo obeema kaj aminda, bovo fortika, flor-korbo elspiranta printempan odoron kaj bela homfiguro...

Tie ne estas laborejo de majstroskulptisto, sed laborejo de ordinara laboristo de la Ŝanhaja Kaŭĉuko-fabriko klerigita nur mezlerneje. Lia profesio estas riparo de lignajistaj instrumentoj. Skulpti kaj kolekti radiko-skulptaĵojn estas nur lia amatora ŝatokupo.

La 41-jara He Yugen jam faris pli ol 200 skulptaĵojn. Kelkfoje, tute absorbata en la skulptado, li eĉ forgesis la manĝon. Li diris: "Por mi, tio estas ĝuo."

Iam li portis siajn radiko-skulptaĵojn en ekspozicion por akiri alies aprobon. Liaj radiko-skulptaĵoj estis montritaj kelkdekfoje en ekspozicioj okazigitaj de la loĝ-kvartalo, distrikto kaj urbo. Iuj konsilis al li vendi iujn kreaĵojn, sed li rifuzis. Li serioze diris al mi: "Mi vivas ne malbone. Do, mi faras radiko-skulptaĵojn nur por es-

primi mian strebon al la arto, sed ne por mono."

En Ŝanhajo, neraraj estas tiaj civitanoj, kiuj pasie amas arton kiel He Yugen. Ekz., en la pasinta somero en Putuo-distrikto pli ol 1000 civitanoj eksponis siajn artaĵojn al aliaj. Nun vidiĝas en la hejmo de ordinaraĵoj popolanoj ankaŭ diversaj artaĵoj kiaj skulptaĵoj, ĉinstilaj pentraĵoj, olepentaĵoj, kaligrafiaĵoj, papertondaĵoj, ĉizitaj sigeliloj kaj envaza pejzaĝo kiuj antaŭe vidiĝis nur en belarta domo, muzeo, magazeno de la metiartaĵoj kaj plantid-kultivejo.

En Ŝanhajo, multaj civitanoj rigardas spekon de artaĵoj kiel bonan rimedon por memkulturado kaj vivlongigo. La 55-jara Du Baojun, kiu loĝas en Nova Vilaĝo Caoyang, nomis sian ĉambreton "Yuhua-Loĝejo". Ĝis nun, ŝi kolektis pli ol 1000 pecojn de Yuhua-ŝtonetoj, el kiuj pli ol dekono estas delikataj kun kompare alta artvaloro. Ŝi diris al mi: "Spekti la ŝtonetojn estas distriĝo saĝiga kaj vivlongiga."

Koncerne spektadon de la artaĵoj, la maljuna Xu Genbao akiris multe en la vivlongigo.


Malgraŭ ke Xu jam havas la aĝon de pli ol 70 jaroj, li piediras facile, kaj aspektas nur 50-jara.

Tion li atribuis al la kultivado de floroj kaj plantoj. Pro la malvasteco de la loĝejo, li konstruis balkonon de malpli ol 2 m². Sur la balkono li kulturis dekojn da specoj de floroj. Li diris al mi, ke tie estas cembro, kamelio k.t.p.

Li kutimas bicikli al foiro de birdoj kaj floroj en serena tago. En la foiro li komparis la envazajn pejzaĝojn, kostajn je kelkdek juanoj kaj 100 juanoj kun tiuj sur sia balkoneto. Ĝenerale li preferas la siajn kaj sekve li hejmen revenas kantante mallaŭte en ĝojo.

Ŝajnas, ke en Ŝanhajo oni estas ne kontenta pri rigardo de artaj programeroj en teatroj kaj sekve la koncertoj kaj prezento de laŭmodaj vestoj ofte vidiĝas en familioj.

Mi intervjuis iun familian koncerton en Cao'an-kvartalo. En tiu granda familio el dekelkaj membroj ĉiuj ŝatas kanti kaj ludi muzikilojn. Zhang Keqin, la 72-jara estro de la familio, estas amanto de la pekina opero. Influataj de li, ne nur liaj gefiloj, sed ankaŭ liaj bogefiloj kaj nepinoj enamiĝis al la pekina opero. El ili plej bone kantas lia plej aĝa filino Zhang Yuwen. En la feriaj tagoj la tuta familio kunvenis kaj kantis operojn por sin plezurigi. Zhang Yuwen



Unika florbedo de Xu Genbao

diris al mi: “Mi deziris fariĝi profesia artistino, sed nun mi opinias melomanon pli interesa, ĉar en la postlabora ensemblo mi povas ludi laŭplaĉe.”

En Ŝanhajo, mi renkontiĝis kun kelkaj gemaljunuloj, kiuj ofte partoprenis la prezentadon de laŭmodaj vestoj. Ili tion faras ne por vendi vestojn, sed por montri siajn belajn vestojn kaj kontentigi sian deziron de prezentado. Iu maljunulino havas cent kompletojn da vestoj, multe pli ol ŝia filino. La 63-jara Lin Shufang diris al mi: “Antaŭe, la ekonomia kondiĉo kaj mia animstato ne permesis al mi la beligon. Nun mia enspezo multiĝis. Mi sentas min pli kaj pli juna. Sub tiel favoraj vivkondiĉoj, mi devas vivi la vivon pli bele por kompensi la antaŭan bedaŭron.”



Prezentado de modaj vestoj por mezaĝuloj kaj maljunuloj

POR KOMENCANTOJ

Liftistino


EN la domo, kie mi loĝas, laboras juna liftistino. Ŝi, per sia afableco kaj servemo kontentigas ĉiujn, kiuj eniris en la lifton.

“Bonan matenon!” ŝi salutas kun rideto ĉiujn, kiuj iras al la laboro.

“Bonan vesperon!” ŝi salutas kun rideto ĉiujn, kiuj revenas hejmen.

“Ne hastu!” ŝi diras al maljunuloj kaj helpas ilin eniri en la lifton.

Por gastoj estas malfacile tuj trovi la ĉambron de la vizitatoj, ĉar la domo havas du enirejojn kaj plurajn koridorojn. Tiam oni ofte aŭdas ŝian voĉon: “Kiun etaĝon vi volas? Mi



akompanu vin!” Atinginte la pordon, ŝi premas butonon por la gasto.

EKZAMENO DE LA SPORTAJ

FORTOJ DE ĈINIO


JE la 2-a de okt. 1988, finiĝis la 24-aj Olimpikoj, kiuj daŭris 16 tagojn en Seulo. Ili tamen, kiel spegulo prezentanta la nunan sportan nivelon de la mondo, ekzistos plue kaj donos influon.

10000 sportistoj el 160 landoj kaj regionoj partoprenis en la olimpiaj ludoj, rompis 27 mondajn rekordojn kaj 85 olimpikajn rekor-

dojn. Tio markis pli altan, pli rapidan kaj pli fortan grimpojn de la homaro kun la olimpika spirito. Sovetunio, Germanio DR kaj Usono gajnis la unuajn tri lokojn laŭ la nombro de oraj medaloj. Inter la gajnintoj de oraj medaloj troviĝis ankaŭ kenja, turka kaj surinama sportistoj. Ĉinaj sportistoj gajnis 5 orajn, 11 arĝentajn kaj 12 kuprajn medalojn kaj okupis

la 11-an lokon laŭ la nombro de la gajnitaj oraj medaloj.


En la olimpiaj ludoj ĉinaj sportistoj faris profundan impreson sur la spektantoj en plonĝo, naĝo kaj remado. En tiuj sportaj branĉoj ĉinaj sportistoj montris pli grandan esperon ol en surteraj sportaj branĉoj. Precipe en plonĝo ĉinaj gesportistoj gajnis 2 orajn, 3 arĝentajn kaj unu kupran medalojn. La 17-jara ĉina knabino Gao Min gajnis la oran medalon en virina trampolina plonĝo je 45.90 poentoj pli ol la totala poentaro de la subĉampiono. En la vira turplonĝo 14-jara ĉina plonĝisto Xiong Ni gajnis la duan lokon nur je 1.14 poentoj malpli ol la totala poentaro de la fama usona plonĝisto Grego-



Li Meisu gajnis la trian lokon en la konkurso de pezglobo-jeto.

Zhuang Yong gajnis la arĝentan medalon de la virina 100-metra rapid-naĝo.





Lou Yun, gajninto de la ora medalo de vira ĉevalado





Xu Yanmei, ĉampionino de virina trampolina plonĝo, gajnis por Ĉinio la unuan oran medalon en la olimpikoj.

Foto de ZHANG XIAOJING

Ĉinaj sportistinoj gajnis arĝentan medalon de la virina kvarpersona unuremila kanuado kun rudristo.

Foto de SUN XIAOQING





Ĉinaj sportistoj en la inaŭguro

ry Louganis.

La ĉinaj gesportistoj antaŭe estis malfortaj en naĝo kaj remo kaj neniam eniris en la finalon de monda konkurso. Ĉinaj gesportistoj unuafoje gajnis medalojn en tiuj du sportaj branĉoj kaj vekis atenton ĉe la publiko. La ĉina naĝistino Zhuang Yong gajnis la unuan arĝentan medalon, fininte 100-metran naĝon per 54"25 en la lasta etapo de la 4x100-metra virina stafeta naĝo, je 0.48 sekundo pli rapide ol la monda rekordo de virina 100-metra libera naĝo kreita de Kristin Otto antaŭ 2 jaroj. Ĉina sportistino Li Sumei gajnis la trian lokon de virina pezglob-feto kaj per tio akiris valoran atletisman

medalon por la ĉina teamo. Ĉina boksisto Liu Dong eniris en la vicon de la unuaj ok olimpikaj boksistoj, post kiam la boksado estis nuligita en Ĉinio 28 jarojn.

Tamen la grava signifo de la olimpiaj ludoj estas tio, ke ili konigis la distancon inter la ĉina sporto kaj tiu de la sportaj potencoj, precipe en iuj ĉefaj sportaj branĉoj, kiaj atletismo, naĝo, piedpilko, viraj korbopilko kaj flugpilko. En gravaj mondaj konkursoj de tiuj sportaj branĉoj Ĉinio antaŭe malofte gajnis medalon. Ĉi-foje en la olimpikoj oni vidis ankaŭ, ke Ĉinio perdis aŭ perdas sian superecon en iuj sportaj branĉoj tradicie fortaj por Ĉinio, kiaj vira gimnastiko, vi-

rina flugpilko kaj tablotenis. Ĉinaj sportistoj estis plej fortaj en tablotenis multjare, sed ĉi-foje kiel en domen-ludo 3 ĉinaj tablotenisistoj inkl. viran solludan mondan ĉampionon, sinsekve falis en nur 2 horoj kaj estis elpuŝitaj el la unuaj 4 lokoj de la vira solludo. La Ĉina Virina Flugpilka Teamo, kiu 5-foje sinsekve gajnis la mondan ĉampionecon, eĉ ne montris sian nivelon en la olimpiaj ludoj. En la konkurso kun la sovetunia teamo, ĉinaj flugpilkistinoj ne montris sian fortan rezistpovon kontraŭ la forta atako kaj blokado de la rivaloj. Ili perdis 3 matĉojn per 0:15, 9:15 kaj 2:15 kaj sekve de tio perdis la rajton por akiri oran medalon. En la gimnastiko de la 23-aj Olimpikoj la ĉina teamo gajnis 4 orajn medalojn, sed ĉi-foje nur unu oran medalon pro manko de malfacilaj kaj novaj movoj kaj diversaj eraroj.

Oni eble memoras, ke en la 23-aj Olimpikoj en Los-Anĝeleso dank' al sia penado la ĉinaj sportistoj gajnis 15 orajn medalojn. Laŭ la nombro de la gajnitaj oraj medaloj Ĉinio okupis la 4-an lokon. Ĉi-foje Ĉinio gajnis nur 5 orajn medalojn kaj okupis la 11-an lokon. Kiel analizite de iuj sportaj spertuloj, la malsukceso de ĉinaj sportistoj en iuj tradicie fortaj branĉoj rezultis kompreneble el ŝanĝiĝo de la mondaj sportaj fortoj, kaj malkaŝis mankojn de ĉinaj sportaj rondoj en teknikoj, trejnado kaj administra sistemo. Iuj ĉinaj halterlevistoj kaj pafistoj altnivelaj montris sin anormalaj en la koncernaj konkursoj, kio malkaŝis iliajn mankojn en psika kaj kultura kvalito.

La 24-aj Olimpikoj sendube estis kompleta ekzameno de la ĉinaj sportaj fortoj kaj samtempe faris al la ĉinaj sportistoj problemon: Kiel levigi de la malsukceso kaj kuraĝigi la avangardajn? Post 4 jaroj ilia respondo estos prijuĝita en la Olimpikoj de Barcelono de Hispanio.

FESTO DE TAISHAN-MONTO

de CHEN BAOHE

EN septembro de 1988, Taishan-monto, la unua el la kvin famaj montoj de Ĉinio, kiu troviĝas en la “nomlisto de la mondaj heredaĵoj”, pasigis sian feston — la Duan Internacian kaj Tutlandan Alpisman Festivalon de Taishan-monto.

La impona kaj apika monto Taishan troviĝanta en la provinco Shandong oriente de la Nordĉinia Ebenajo estas honorita kiel “kolono sub la orienta ĉielo”. Sur la monto konserviĝas multaj postrestaĵoj de antikva kulturo, inkluzive de 22 relative sendifektaj konstruaĵoj. De la piedo ĝis la supro de la monto dislokiĝas pli ol 2000 steloj kaj gravuraĵoj, inter kiuj estas multaj majstraĵoj.

La unikaj naturdotitaj pejzaĝoj kaj kulturaj restaĵoj de Taishan favoris la urbon Tai-an tuj ĉe la monto, ke ĝi okazigis en 1987 la unuan alpisman festivalon por diskonigi al la mondo la belajn pejzaĝojn kaj brilan kulturon de Taishan-monto kaj akceli la kulturajn kaj ekonomiajn interrilatojn kun diversaj lokoj.

La Dua Alpisma Festivalo altiris multajn ŝatantojn de montogrimpado kaj turistojn. La montogrimpan konkurson ĉeestis pli ol 400 sportistoj el Aŭstralio, Kolombio, Usono, Sovetunio, Kanado, Ĉinio kaj aliaj 15 landoj. En tiu tago pli ol 12000 urbanoj de Tai-an kaj turistoj grimpis sur la monton.

Frumatene de la 14-a de septembro de 1988, la konkursantoj kaj miloj da urbanoj solene inaŭguris la festivalon en la urbocentra


placo. La festivalon buntigis “Draka Danco” kaj aliaj programejoj plenaj de lokaj gustoj.


Duonon post la 9-a horo, pli ol

400 konkursantoj ekiris en nebula pluvo al la monto akompanate de huraado de urbanoj. Tuj ĉe la starto kolombia junulo Fabio jam iris plej antaŭe. Li trairis ĉ. 10 kilome-

Grimpantoj proksimiĝas al la celo.

Foto de LIAN HAISHENG





trojn per 1 horo, 7 minutoj kaj 25 sekundoj kaj atingis la unua la supron de la monto. Li gajnis la ĉampionecon de la vira grupo de la internacia konkurso. Japana junulino Asako Jokojama gajnis la unuan lokon de la virina grupo de la konkurso. Ŝi uzis 2 horojn kaj 27 sekundojn por atingi la montosupron.

La gajninto de la ĉampionecon de la ĉina vira grupo estis junulo Duan Chongjin loĝanta ĉe la montpiedo. Li estis ankaŭ ĉampiono de la vira grupo de la unua festivalo. Ĉi-foje li uzis 59 minutojn kaj 7 sekundojn por la tuta distanco, du minutojn pli mal multe ol en la unua festivalo. Junulino Han Feng de la provinco Shandong gajnis la ĉampionecon de la virina grupo. Ŝi uzis 1 horon, 16 minutojn kaj 27 sekundojn por la tuta distanco.

Kiam la konkursantoj atingis la montosupron unuj post aliaj, ĉesis la nebula pluvo. Ili ĝuis la vastan panoramon de smeraldaj kampoj kaj montoj. Ĝuante la superban pejzaĝon, ili hurais kaj faris fotojn por memoro. La montosupro dronis en festa gajeco kaj ĝojo pro la sukceso.




Draka danco por la inaŭguro
Foto de LIAN HAISHENG



Pola kameraisto en laboro

Foto de WANG DONGHAI



Ĉina grimpanto
Foto de YANG LIMING

Kolombia junulo Fabio, gajninto de la ĉampionecco
de la internacia vira grupo
Foto de LIAN HAISHENG



UNO POR LA MONDA MALSTREĈIĜO

de CHEN YE

LA 8-an de aŭgusto de la pasinta jaro la ĝenerala sekretario Perez de Cuellar solene deklaris en la Konsilio de Sekureco de UNO, ke la 20-an de aŭgusto, 1988, oficiale ĉesos la milito inter Irano kaj Irako, militintaj jam ok jarojn. La informo ĝojigis la tutan mondon. La publika opinio de diversaj landoj laŭdis, ke UNO akiris brilajn sukcesojn unu post alia en solvo de lokaj konfliktoj kaj ludas pli kaj pli gravan rolon en defendo de la mondopaco.

BRILAJ SUKCESOJ

En la paca solvo de lokaj konfliktoj UNO faris breĉon unue en la problemo de Afganio. En 1981 la speciala reprezentanto de la ĝenerala sekretario de UNO venis al Ĝenevo, peris nerektan intertraktadon inter Pakistano kaj la Kabula reĝimo, kiu daŭris ses jarojn, kaj interkonsentigis pri revenigo de rifuĝintoj de Afganio, reciproka neinterveno en la internaj aferoj kaj internacia garantio. Fine li reduktigis la tempon retiri la sovetuniajn trupojn el Afganio de keldek monatoj al naŭ monatoj, kio kreis favoran kondiĉon por fine solvi la problemon. Post tio reprezentantoj de Sovetunio, Usono, Pakistano kaj Afganio kunvenis en Ĝenevo, prezidate de la ĝenerala sekretario Perez de Cuellar, kaj subskribis interkonsenton pri la problemo de Afganio. Ĝuste kiel la ministro de la eksteraj aferoj de Sovetunio E. A. Ŝevardnadze diris: "Solvo de la problemo de Afganio per interpacigo atestas, ke UNO

povas akceli solvon de nunaj plej kompleksaj konfliktoj."

Se oni diras, ke en la solvo de la problemo de Afganio UNO ludis nur akcesoran rolon, do en la interpacigo de Irano kaj Irako ĝi ludis pli efikan rolon. La 20-an de julio, 1987, la Konsilio de Sekureco aprobis la rezolucion N-ro 598, kiu donis favoran kondiĉon por justa kaj racia solvo de la konflikto inter Irano kaj Irako. En la sekvanta jaro por efektiviĝi tiun historian rezolucion la ĝenerala sekretario de UNO faris penigan, paciencajn kaj kreivan interpacigon al Irano kaj Irako kaj faris koncernan projekton. Dank' al la interpacigo de UNO kaj aliaj landoj Irano kaj Irako fine akceptis la rezolucion kaj efektivigis kompletan armisticon en la 20-a de aŭgusto,

1988. Poste la reprezentantoj de ambaŭ landoj faris rektan intertraktadon, prezidate de Perez de Cuellar. Fine venis aŭroro de paco post la tragedia, kruela kaj longtempa milito inter Irano kaj Irako.

Tamen la ĝenerala sekretario ne kontentiĝis je la akirita historia sukceso, li tuj prenis sur sin taskon de nova interpaciga provo. La 11-an de aŭgusto de la pasinta jaro en Nov-Jorko li faris al la reprezentantoj de Maroko kaj la Okcidenta-Sahara Popola Fronto kompletan projekton por solvi la problemon de la Okcidenta Saharo. La projekto donis esperon por paco al la regiono kie la milito jam daŭris 13 jarojn. Instigate de la ĝenerala sekretario, la gvidantoj de grekoj kaj turkoj de Cipro okazigis kunvenon en Ĝenevo la

S-ro Perez de Cuellar (maldekstre) kaj la ministro de eksteraj aferoj de Irano



24-an de aŭgusto de la pasinta jaro. Ambaŭ flankoj konsentis ellabori projekton por solvi la konflikton kaj, akceptinte la proponon de la ĝenerala sekretario, komencis en septembro de la pasinta jaro la pacan intertraktadon interrompitan antaŭ tri jaroj.

Dum la intertraktado de Angolo, Kubo, la Suda Afriko kaj Usono rapide progresis, UNO ludas pli gravan rolon en solvo de la problemo en la sud-okcidenta Afriko.

KIALOJ DIVERSAJ

UNO ludas tiel aktivan rolon, kion oni ne konas en la historio. Jen la kialoj:

Unue, la tuta internacia situacio spertis rimarkindan kaj pozitivan ŝanĝiĝon. Plue disvolviĝis la tendenco batali por paco kaj disvolviĝo de diverslandaj popoloj de la mondo. La rilatoj inter Sovetunio kaj Usono malstreĉiĝas. La rapida disvolviĝo de sciencoj, teknikoj kaj ekonomio pliiĝis la reciprokan dependecon de diversaj landoj kaj regionoj en ekonomio,

socio, medio kaj aliaj gravaj kampoj kaj postulas pli intiman kunlaboron. La tria mondo deziras solvi siajn urĝajn problemojn en la internacia kunlaboro. Oni denove sin turnis al plurflanka diplomatio. Ĉio ĉi tio donas favorajn kondiĉojn al UNO en la aktivado.

Due, la rilatoj inter Usono kaj Sovetunio pli kaj pli boniĝas kaj ili ambaŭ deziras solvi iujn problemojn pere de UNO. En sia artikolo M. S. Gorbaĉov konfirmis la pozitivan rolon de UNO en la nuna mondo, proponas plifortigi ĝian povon en prevento de konfliktoj kaj jugo de krizoj kaj faris serion da proponoj. Ekde 1988 la usona registaro energie instigas la Konsilion de Sekureco de UNO kaj ĝiajn konstantajn membrolandojn diskuti pri solvo de la konfliktoj inter Irano kaj Irako kaj fervore helpas la ĝeneralan sekretarion en la interpacigo. Post la intepacigo de Irano kaj Irako la usona registaro proponis sendi militistan observan grupon al la du landoj kaj promesis doni la necesan monon. Sed antaŭe Usono kaj Sovetunio kvereladis en UNO kaj ofte uzis nean rajton, kio ege malfaciligis la sol-

von de gravaj internaciaj problemoj. La mildiĝo de la rilatoj inter Usono kaj Sovetunio kaj la ŝanĝiĝo de ilia sinteno objektivite favoras al UNO en la defendo de la mondpaĉo kaj sekureco.

Trie, la landoj, kiuj involviĝis en konfliktojn, jam ekkomprenis, ke sola milito ne povas solvi konfliktojn, kaj sin turnis al politika solvo. Tial oni pli alte taksis la rolon de UNO kaj esperas, ke UNO akordigos la konfliktantajn flankojn.

Kvare, la ĝenerala sekretario Perez de Cuellar alte taksas la funkciojn de UNO kaj aktive faras interpacigon, kio ludas apartan rolon en solvo de lokaj konfliktoj. En la lastaj jaroj Perez de Cuellar navetis inter diversaj varmaj punktoj tra la tuta mondo kaj faris diversajn iniciatojn. La rezolucio n-ro 598 de la Konsilio de Sekureco de UNO ja estas farita surbaze de la ses pacaj proponoj por solvi la problemon de Irano kaj Irako iniciatitaj de la ĝenerala sekretario. Ĝuste la iniciatoj kaŭzis la gravan diskuton de la kvin konstantaj membrolandoj de la konsilio.

PEZAJ TASKOJ POR UNO

Ke UNO akiris unu post alia sukcesojn en solvo de lokaj konfliktoj, tio montras, ke UNO ludas pli kaj pli grandan rolon en defendo de la mondpaĉo kaj sekureco. Okcidentaj publikoj opinias, ke UNO nun efektivas la revon de siaj kreantoj — solvi ĉiujn konfliktojn per internacia interpacigo kaj defendo de paco.

Por komplete disvolvi sian rolon UNO alfrontas multajn seriozajn defiojn. UNO akiris brilajn sukcesojn en solvo de lokaj konfliktoj, tamen ĝi apenaŭ havas sukceson en la kampoj de la tutgloba malarmado kaj disvolvo de ekonomio. Por ĝi la taskoj estas tre pezaj en la defendo de la mondpaĉo kaj disvolviĝo.

S-ro Perez de Cuellar kaj la ministro de eksteraj aferoj de Irako



LA LANDLIMA URBO

MANZHOU LI

LA vetero de aŭgusto en Manzhouli estis serena.

Manzhouli kun 110000 loĝantoj situas en la nordorienta Ĉinio. En la urbo, kie ne veturas aŭtobusoj nek vidiĝas homfluoj, regas pureco kaj kvieteco.

Ambaŭflanke de la stratoj ofte vidiĝas rus-stilaj konstruaĵoj. Inter ili la plej tipaj estas domoj el arbotrunkoj. En tia domo malvarmetas somere kaj varmas vintre, eĉ kiam atakas malvarma fluo el Siberio, ĝi varmetas ene.

La urbo distancas de Sovetunio je nur 9 km. Se oni veturas de ĝi okcidenten, baldaŭ oni jam atingas

la landlimon inter Ĉinio kaj Sovetunio. Tie mi vidas, ke oni konstruas novan pordon de lando. La fervojo trapasas la pordon kaj ligiĝas kun tiu de Sovetunio. La loko jam fariĝis pordo de amika kontakto inter Ĉinio, Sovetunio kaj eŭropaj landoj.

La estro de landlima stacio de Ĉinio estas juna oficiro. Li diris, ke dum multaj jaroj en la pasinteco tie regis streĉa atmosfero. Nun la urbo estas malfermita al fremdaj landoj. Turistoj povas grimpi sur la gvatturon por ĝui la naturan pejzaĝon.

Ĉirkaŭ la stacio sterniĝas la bela stepo Hulun Boir. En agrabla

aŭgusto sur la stepo pompas diverskoloraj sovaĝaj floroj kiuj elspiras aroman odoron de tempo al tempo. Montrante konstruaĵaron en malproksimo, la estro diris, ke ĝi estas la urbo Post-Bajkalsko de Sovetunio. Ĝi aspektas ne tre granda, sed kvieta kaj bonorda. Januare de la pasinta jaro denove komenciĝis la negoca kontakto inter Ĉinio kaj Sovetunio, kiu ĉesis antaŭ 20 jaroj. Ambaŭ urboj plurfoje sendis siajn delegaciojn por fari viziton kaj komercan traktadon.

En la komenco de la 50-aj jaroj la urbo havis nur 7000 loĝantojn. Tie somere estas mallonga kaj vintro longa, kio ne favoras kreskon de agrikulturaj plantoj. Tamen la loko estas trafika trapasejo inter Eŭropo kaj Azio kaj poste disvolviĝis en gravan komercan urbon de Ĉinio. Historie la ŝarĝa kaj malŝarĝa kvanto de varoj atingis 3.8 milionojn da tunoj. La varoj importitaj kaj eksportitaj tra la urbo estas transportitaj ĉefe per fervojo kaj ŝoseo. Aprile de la pasinta jaro, la unuafoje interŝanĝitaj varoj de la du landoj estis importitaj kaj eksportitaj tra la fervojo de Manzhouli, post kiam denove komenciĝis la negoca aktivado inter Ĉinio kaj Sovetunio. La negoco inter Ĉinio kaj Sovetunio plenumiĝis en la formo de varo kontraŭ varo. Ĉinio eksportas pli ol 40 specojn da varoj, kiaj vestoj, ŝuoj, ĉapoj, sukero, manĝilaro, ludiloj kaj legomoj, bonvenaj en Sovetunio. La varoj eksportataj de Sovetunio al Ĉinio estas cemento, ligno, kemia


Sovetiaj gastoj en butiko de Manzhouli



sterko k.a. urĝe bezonataj de Ĉinio. Krome, ambaŭ flankoj traktas pri teknika kunlaboro. Ĉinio eksportos al Sovetunio legomkultivan kaj arkitekturan teknikon, dum Sovetunio eksportos al Ĉinio bonrasajn ŝafojn kun fajna lano por plibonigi la ŝafrason de Hulun Boir. Vicdirektoro Man de la Landlima Komerca Kompanio de la urbo diris, ke la dulanda negoco interrompiĝis antaŭ multaj jaroj. Nun ĵus restariĝas la negoco. Estas brila la perspektivo. Tamen ĝi alfrontas iujn malfacilojn, ekz., limigita transportado.

25 km oriente de Manzhouli estas karbominejo Zalainuoer, kie vivas 70000 loĝantoj de Manzhouli. La karbominejo havas subteran karborezervon de 10.1 miliardoj da tunoj kaj produktas pli ol 4 milionojn da tunoj da karbo ĉiujare.

Zalainuoer signifas marsimilan lagon en la mongola lingvo. En la okcidenta parto de la minejo kuŝas la vastega lago Dalai, la kvina dolĉa lago de Ĉinio. Starante ĉe la lago, oni sentas sin kvazaŭ ĉe maro, sed ĝi estas kvieta. En la



La fervoja stacio de Manzhouli

lago vivas multaj fiŝoj. Ili ofte saltas el akvo.

La kulturo de Zalainuoer havas longan historion. En la 30-aj jaroj oni tie elterigis la fosilian kranion de Zalainuoer-homo. Poste oni elterigis mamutan fosilion kaj trovis ruinon de paleolitika kulturo, kio faris sensacion inter arkeologoj en- kaj eksterlandaj. Laŭ ekspertizo, Zalainuoer-

homo apartenis al la mongola raso kaj vivis antaŭ ĉ. 10000 jaroj. Sed oni ne scias kien ili iris poste.

La manzhouli-anoj estas malkaŝemaj kaj gastamaj. En la minejo oni ricevis pli fortan impreson pri tio. Tieaj loĝantoj estas drinkemaj. Ili ekkantas, kiam ili drinkas multe, eĉ en restoracio kun multaj manĝantoj. La kaŭzo eble estas, ke Manzhouli estas stepa urbo.

KORESPONDI

DEZIRAS

* 40-j. laboristo dez. kor. tm. Manfred Drobusch, Grebser Str. 47, Prutzke, DDR-1801, GDR.

* Dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Jelena Strojko, Zakrevskogo 19-66, 252217 Kiev, USSR.

* 18-j. hispana esperantisto dez. kor. kun geesp-istoj tm. hispane aŭ esperante. Jesus Ma Burgueno., c/Mendivil 2,12,A., 29002 Malaga, Hispanio.

* Frydrysek Dusan, 24-j., kolektas bierajn glumarkojn. Adr.:

Smetanova 522, CS-751 31 Lipnik n.B, Ĉeĥoslovakio.

* S-ro Alfredas Maruška, 34-j. kuracisto (neŭrologio, narkologio) okupas sin pri akupunkturo kaj aliaj senmedikamentaj kuracmetodoj. Kolektas neŭrologiajn maleojn. Dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: P.K. 50, SU-235250 Pasvalys, Litovio, Sovetunio.

* 16-j. junulo dez. kor. kun aliaj gejunuloj tm. pri Esperanto kaj ĉiuj temoj, interesiĝas pri fotoarto, lingvoj kaj vojaĝoj. Adr.: Mariusz Sobolewski, Str. Podlesna 5a/m 45, PL-15-227 Bjalistoko, Pollando.

* 16-j. junulo dez. kor. kun gejun-

uloj tm. pri ĉiuj temoj, interesiĝas pri fotoarto, lingvoj kaj vojaĝoj. Adr.: Andrzej Grzegorz Kiercul, Str. Podlesna 5 m 14, PL-15-227, Bjalistoko, Pollando.

* 18-j. lernanto ŝatas kor. kun knaboj aŭ knabinoj el Ĉinio. Adr.: Šalga Peter, Tarnaors, Deak F.ut 15, 3294, Hungario.

* Jakupovic Mehmed, filatelisto, dez. kontakti kolektantojn de Estampoj en Ĉinio. Adr.: Franje Matkovic 16, Rijeka, Jugoslavio.

* 40-j. flegistino serĉas kontaktojn tm. pri ĉiuj temoj, gastigado eblas. Certe respondos. Adr.: Jadwiga Litwicka, ul Moniuszki 3/12, PL-67-200 Glogow, Pollando.

SENDROGAJ TERAPIOJ DE LA ĈINA MEDICINO (II)

de ZHANG ZHAOYUN

POR kuraci malsanulojn suferantajn doloreton de muskolo pro malvarmumo, ĉinmedicinaj kuracistoj ofte aplikas al ili kupan terapion. Tiu ĉi terapio estas simpla kaj benefika.

La kupoj ĝenerale estas ceramikaj, bambuaj kaj vitraj. La kupa terapio povas kuraci multajn malsanojn, precipe korpopartan malvarmumigon, tusadon pro malvarmo, astmon, kapdoloron, muskolan trostreĉigon, reŭmatisman doloron, ventrodoloron de malvarmo, lakson, tordlezon kaj kontuzon, mordovundon de venena serpento k.a. Nun oni ĝenerale aplikas kupadon laŭ jenaj manieroj:

A. Bruligu paperslipeton, jetu ĝin en la kupon kaj tuj almetu la kupon al la malsana korpoparto. Tio taŭgas por flanka almeto por eviti brulvundon al la haŭto.

B. Etendu alkoholan flamon en la kupon por momento, retiru ĝin kaj tuj almetu la kupon al la malsana korpoparto. Nepre ne varmigu la randon de la kupo por eviti brulvundon.

C. Ŝmiru la kuracotan lokon kaj la aperturan randon de la kupo per vazelino aŭ alispeca oleo. Kiam la kupo suĉfiksiĝas al la haŭto, kaptu ĝin per mano kaj modere

puŝu ĝin sur la malsana korpoparto supren, malsupren, dekstren kaj maldekstren 6-8 fojojn ĝis la haŭto ruĝiĝas aŭ sango akumuliĝas tie. Tiu ĉi maniero de kupado taŭgas por kuraci kontuzan doloron de talio, dorso kaj karnoriĉaj partoj de la kvar membroj kaj reŭmatisman doloron.

Ankaŭ masaĝo estas ofte uzata sendroga kuracmetodo. En la pratempo, kiam akupunkturo kaj drogoj estis ankoraŭ ne trovitaj, oni jam scipovis masaĝi por kuraci malsanojn.


Masaĝo povas akceli la cirkuladon de homa vitala energio kaj sango, vigligi *ginglĉuo*-vojojn, har-

moniigi *jin* kaj *jang*, sekve vigligi la spiriton kaj artikojn, refreŝigi la energion kaj fine forigi malsanojn.

La masaĝaj manipulaĵaj manieroj ĝenerale estas premi, froti, premi per dikfingra-ungo, knedi, puŝi, pinĉi, cirkle fingro-puŝi, forte froti, torde knedi, fingre skrapi, frapi, bati, kvinfingropinte bati, forte premi, du-dikfingre puŝi ambaŭflanken kaj du-dikfingre puŝi internen.

Antaŭ la masaĝo la kuracisto devas fari ĝustan diagnozon. La fundamentaj masaĝ-metodoj por adoltuloj kaj por infanoj estas malsamaj. Al adoltuloj, oni masaĝas ĝenerale la malsanajn korpopar-

Kupado



ABONU "EL POPOLA ĈINIO"

Nun komenciĝas abonvarba kampanjo 1989 por "El Popola Ĉinio". EPĈ kun interesaj artikoloj kaj belaj bildoj raportas pri Ĉinio en diversaj flankoj kaj E-movado en kaj ekster Ĉinio. Tiu, kiu abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1988.10.01 ĝis 1989.02.28), ricevos unu koloran kalendaron 1989 en Esperanto. La abonvarbantoj ricevos ĉinstila(j)n memoraĵo(j)n laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: *Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.*

ABONTARIFO DE EPĈ (ekvalidas la 1-an de oktobro 1988)

lando	valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.00	25.00	35.00
Aŭstrio	ATS	200	340	480
Belgio	BEF	550	930	1300
FR Germanio	DEM	30.00	50.00	70.00
Britio	GBP	8.00	13.60	19.00
Finnlando	FIM	64.00	108.00	150.00
Francio	FRF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	ESP	1200	2000	2900
Italio	ITL	18000	30600	43000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Jugoslavio	YUD	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZD	20.00	34.00	48.00
Portugaliao	PTE	1100	1800	2600
Svisio	CHF	25.00	42.00	60.00
Usono	USD	12.00	20.00	28.00
Kanado	CAD	14.00	23.00	33.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:

GBP	8.00	13.60	19.00
USD	10.00	17.00	24.00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

GBP	5.00	8.50	12.00
USD	6.50	11.00	16.00

tojn, sed al infanoj, oni masaĝas apartajn akupunkturajn punktojn per apartaj manipulaĵoj manieroj. Por kuraci adoltajn malsanulojn, oni ofte aplikas manipulaĵojn manierojn puŝi, pinĉi, frapi, bati, kvin-fingropinte bati, forte premi kaj du-dikfingre puŝi internen masaĝante la tutan korpon aŭ malsanan korpoparton. Por masaĝi la tutan korpon, oni masaĝas laŭ jena ordo — la kapon, kolon, bruston, ventron, dorson, talion, suprajn kaj malsuprajn membrojn 1-5-foje por vigligi la cirkuladon de vitala energio kaj sango. Tio estas certagrade efika por kuraci paralizon kaj hemiplezion ĵus kaŭzitaĵojn de apopleksio, sensentiĝon de kvar membroj, muskolan konvulsion k.a. Malsama korpoparto estas masaĝata por kuraci diferencon malsanon. Por kuraci doloron de la kapo, okuloj, dentoj aŭ oreloj, oni masaĝas la kolon. Por forigi "fajron" (varmmalsanon) de la kolo kaj pulmo, oni masaĝas la bruston. Por forigi varmon de la hepato kaj renoj oni devas masaĝi la dorson. Por kuraci gas-stagnon varman kaj malvarman, dispepsion kaj ventrodoloron oni masaĝas la supran abdomenon. Por kuraci malsanon de la renoj kaj talio oni masaĝas la malsupran abdomenon. La ofta doloreto kaj sensanga traŭmato povas esti kuracataj per korpoparta masaĝo.

Unuvorte, la masaĝo estas aplikebla al adoltuloj por kuraci apopleksian paralizon, artikan doloron reŭmatisman, hepatalgion, gastralgion, singulton kaj vomadon, malvarmumon, kapdoloron, sendormecon, traŭmaton, dentodoloron, hernion k.a. sed masaĝo estas malpermesata aŭ atente uzata por kuraci gravedulinon, malsanulon suferantan de febro, ascito pro hepata cirozo, diversspeca hemoragio, akutaj infektaj malsanoj, frakturo, luksacio, karbunklo, furunko k.a.

VOJAĜO LAŬ YANGZI-RIVERO (25)

Poyang-lago — la Plej Granda Dolĉakva Lago de Ĉinio

Teksto de MEI ZHI

Fotoj de LIU SIGONG

FORLASINTE la malvarmetan pitoreskejon de Lushan-monto, mi ekiris sur la vojon al Poyang-lago.

Ĝi kuŝas en la nordo de Jiangxi-provinco kaj ĉe la suda bordo de Yangzi-rivero. Ĝi kolektas la akvon el 5 riveroj en la prov-


Bredado de molŝelaj testudoj en lago



inco kaj poste verŝas ĝin en Yangzi-riveron. Ĝia areo estas 3210.22 kvadrataj kilometroj. Plus la areo de la lagetoj ĉirkaŭ si, la lago havas areon de 4646.64 kvadrataj kilometroj. Ĝi estas la plej granda dolĉakva lago de Ĉinio.

KUNFLUEJO INTER YANGZI-RIVERO KAJ POYANG-LAGO


La formo de la lago similas al lagenario pendanta sur Yangzi-rivero. Ĝia suda parto estas vasta kaj similas al lagenaria ventro. Ĝia norda akvoĵojo al Yangzi-rivero estas tre mallarĝa kaj similas al lagenaria kolo. La loko, tra kiu la lagakvo fluas en Yangzi-riveron,



Kunfluejo de Poyang-lago kaj Yangzi-rivero. Proksime estas Shizhong-monto.



Surŝipaj familioj



nomiĝas Hukou (Laga Buŝo). Unu horon veturinte de Jiujiang per aŭto, oni povas atingi Hukou.

Ĉirkaŭ la lago estas 12 gubernioj kaj urboj. Hukou-gubernia urbo sidanta ĉe la laga buŝo estas negranda, sed vicleplena. En la lastaj jaroj, Shizhong-monto en la gubernia urbo altiris al si pli kaj pli multajn en- kaj eksterlandajn turistojn.

Mi suriris Shizhong-monton posttagmeze en la tago, kiam mi atingis la urbon. Sur la monto prosperas verdaĵoj. La pitoreskejo estas eleganta, kvieta kaj agrabla.

Kial la monto ricevis la nomon Shizhong (Ŝtona Sonorilo)? Troviĝas malsamaj diroj. Iuj diras, ke ĝi havas formon de sonorilo. Post esplorado al la loko, oni opiniis, ke sub krutaj rokoj de la monto estas kavoj kaj fendoj; kiam akvo frapas ilin ene, la loko eligas sonon similan al tiu de granda sonorilo. Ankaŭ mi rampis sur rokon por aŭskulti la diritan sonon, sed mi aŭdis nur sonojn de maŝinŝipoj veturantaj en la lago.

Sur la monto staras Qingzhuo-kiosko, kie oni povas apreci la mirandan kunfluigon de Yangzi-rivero kaj Poyang-lago. La riverakvo estas malklara, dum la lagakvo klara, kio mirigas la turistojn.

INSULETO EN LA LAGO

En Poyang-lago troviĝas 41 insuletoj, unu el kiuj nomiĝas Tangyin. Oni diras, ke antaŭe sur la insuleto kreskis multaj spektakloj, tial la insuleto ricevis la nomon Tangyin (Ombrata de spektakloj).

Mi ŝipveturis de Zhouxi-distrikto de Duchang-gubernio ĉe la lago al Tangyin-insuleto. En la lago mi vidis, ke la lago estas vas-


tega, la malproksima akvosurfaco nebule kunfandiĝas kun la ĉielo. La pejzaĝo forlavis la laciĝon de la turistoj. Post ĉ.50-minuta veturado, ni vidis la insuleton.

La insuleto ĉie estas kovrata de verdaĵoj. Vico da fiŝboatoj kviete kuŝas ĉe borde, sur ili pendas fiŝretoj kaj diverskoloraj vestoj. La insuleto havas areon de nur 1 kvadrata kilometro, sur ĝi loĝas pli ol 100 familioj. Ĝiaj domoj estas konstruitaj el nigraj aŭ ruĝaj brikoj kaj la stratetoj estas mallargaj kaj kotaj. Antaŭ multaj domoj metiĝas riparataj aŭ nove faritaj fiŝboatoj.

Ĉe la vilaĝfino mi babilis kun kelkaj junuloj. Ili konigis al mi, ke la loĝantoj sur la insuleto generacio post generacio vivtenis sin per fiŝado en la lago kaj Yangzi-rivero. En fiŝkapta tempo veturas fiŝboatoj en la lago. Nokte la lamplumoj sur la boatoj flagras sur akvo bele. Antaŭe, en la lago estis multaj diversspecaj fiŝoj. En la 50-aj jaroj unu fiŝboato povis kapti pli ol 700 kilogramojn da fiŝoj ununokte. En la lastaj jaroj pli kaj pli malmultiĝis la fiŝoj. Pro tio, la ŝtato difinis, ke de junio ĝis septembro ĉiujare fiŝado estas malpermesata. Ankaŭ

Fiŝistetoj





La konstruo n-ro 2799

la fiŝkaptiloj malutilaj al kreskado de fiŝoj estas malpermesataj. Tial tiuperiode la fiŝistoj devas hejme ripozi senfare.

La junuloj diris: "Antaŭe multaj fiŝistoj tutjare vivis en sia fiŝboato. Nun iuj fiŝistoj ankoraŭ kutime vivas en sia boato, kvankam ili havas loĝdomon sur la insuleto. Plejparto de la fiŝistoj vivas en sia fiŝboato en fiŝkapta tempo."

Tiam alvenis aro da lernantaj infanoj. Iliaj vestoj estis malpuraj. Ili diris, ke ili lernas en la elementa lernejo sur la insuleto kaj poste lernos en mezlernejo ekster la insuleto.

LA KONSTRUO 2799

Antaŭe, la produktokvanto de fiŝoj en Poyang-lago ĉiujare konsistigis 70% de tiu de la tuta provinco. En la lastaj jaroj, rapide pliiĝis la fiŝkaptaj loĝantoj kaj senĉese grandiĝis la fiŝkaptado, la ovometado kaj kreskado de fiŝoj estis detruitaj. Tio rapide malpliiĝis la akvoproduktan fonton de Poyang-lago kaj la fiŝkaptan kvanton, reduktiĝis ankaŭ la enspezo de fiŝistoj ĉirkaŭ la lago.

Ekde la 60-aj jaroj, la popolo ĉirkaŭ la lago konstruis digojn kaj akvobaraĵojn, ekspluatante 126700 hektarojn da marĉo por produkti

grenon kaj bredi fiŝojn kaj ankaŭ por paŝtado. Ekde 1978, ili konstruis pli ol 4000 hektarojn da fiŝbasenoj.

Dank' al plantado de herbo por bredi fiŝojn la produktokvanto de fiŝoj pliiĝis de 53000 tunoj en 1982 ĝis 101000 tunoj en 1986. Sed iuj lokoj ĉirkaŭ la lago estis ankoraŭ tre malriĉaj. Por ekspluati tiujn lokojn, en 1986 la ĉina registaro faris interkontrakton kun la Monda Nutraĵo-programo de UN por helpi kvar distriktojn de la du gubernioj Duchang kaj Xingzi konstrui fiŝbasenojn kun areo de 1500 hektaroj. Oni numeris la konstruon 2799. Nun la ĉefa parto de la konstruo jam atingis rudimentan skalon kaj ĝiaj akcesoraj konstruoj estas en streĉa konstruado. Mi vizitis la konstruejon en la gubernio Duchang: Sur la senlima kamparo estis vicoj da kvadrataj fiŝbasenoj kaj la akvo en la basenoj radiis arĝente en la sunlumo. Maljuna Yuan, respondeculo de la konstrua oficejo, diris, ke la fiŝidoj estis metitaj en la fiŝbasenojn kaj ili estis donitaj al individuaj personoj laŭ kontrakto. En la lasta jaro oni komencis rikolti fiŝojn kaj ĝia produktokvanto estos pli granda en la kuranta jaro.

GONGQING-KULTUREJO

En 1955, 98 junuloj de Ŝanhajo venis ĉe Poyang-lagon kaj starigis

la kulturejon sur dezerta marĉo post penega laborado de dekoj da jaroj.

Atinginte la kulturejon, mi vidis urbeton plenan de viveco. La lokanoj nomis ĝin Gongqing-urbo.

Zhou Chengli, vicestro de la kulturejo, estas pioniro. Li emocii sciigis al mi, ke la nuna Gongqing-kulturejo estas granda agrikultura kaj industria entrepreno kun 15 entreprenaj branĉoj, inkluzive fabrikojn de lanugaj vestoj, brando, salitaj platigitaj anasoj, porpakaj materialoj, maŝinoj kaj muzikiloj, brutobredejon kaj aliajn.

Poste, mi informiĝis, ke la kulturejo disvolviĝis surbaze de centoj da anasoj. En 1969, plurjara inundigo devigis la ekspluatantan trupon translokiĝi. Tiam sekvis ilin nur centoj da maldikaj anasoj. Ili fondis la fabrikon de salitaj platigitaj anasoj kaj tiujare gajnis profiton de 90000 juanoj. Sed la inundo unuokte faris la lokon en maron. Poste, hazarda ŝanco venigis al ili ideon fari lanugajn vestojn kaj litkovrilojn el anasa plumo, postlasita en preparado de salitaj platigitaj anasoj. Tiel naskiĝis la fabriko de lanugaj objektoj. Nun, la fabriko fariĝis la plej granda entrepreno de lanugaj produktaĵoj en Ĉinio kaj ĝia produktovaloro konsistigas pli ol 80% de tiu de la tuta kulturejo.



Vigla lago

La Fabriko de lanugaj vestoj en Gongqing-kulturejo





"Printempa Ekskurso"

de Zhan Ziqian de Sui-dinastio


ĈINAJ ARTOJ

LA PEJZAĜA PIKTURO DE ĈINIO (I)

de XI JIANG

"Vizito de Imperiestro Minghuang al Sichuan"

de Li Zhaodao de Tang- dinastio





Vigla lago

La Fabriko de lanugaj vestoj en Gongqing-kulturejo





"Printempa Ekskurso"

de Zhan Ziqian de Sui-dinastio


ĈINAJ ARTOJ

LA PEJZAĜA PIKTURO DE ĈINIO (I)

de XI JIANG

"Vizito de Imperiestro Minghuang al Sichuan"

de Li Zhaodao de Tang- dinastio



LA ĉinstila pejzaĝa pikturo prezentas naturajn belaĵojn de montoj kaj riveroj. Estas du skoloj en tiu arto, unu karakterizata per delikataj strekoj dum la alia per libera strekado.

La tradiciaj prezentaj rimedoj de la ĉinstila pejzaĝa pikturo inkluzivas tuĉon, mineralan bluverdon, or-verdon, senstrekan nuanĉadon, palkarmezinon kaj moderan aplikon de koloroj.

Per linioj dikaj kaj maldikaj, ĝlataj kaj krudaj, klaraj kaj malklaraj aŭ nuancado oni prezentas la figurojn. En komponado la pentristoj ne katenas sin al fiksa perspektivo, sed laŭ originala maniero nomata "plurfokusa perspektivo".

Ĉar la pikturo kaj kaligrafio de Ĉinio originis de sama fonto, en la ĉina pejzaĝa pikturo la pentristoj aplikas kaligrafian teknikon, tiel ke la rigardantoj povas vidi proksime la kaligrafian lertecon kaj estas infektitaj de la tuĉado, kaj vidas de malproksime la grandiozan kaj gustoriĉan pejzaĝon kaj ĝuas ĝian belon. En prezentado de malsama natura pejzaĝo, oni devas ĝuste bildigi specifan scenon de la difinita tempo, surpaperigi loĝeblojn kaj rigardindan pitoreskejon inspirantan al poezio, riĉigi la pentraĵon kaj vekigi asocion de ideoj ĉe la rigardantoj.

Laŭ la historio de la ĉina pikturo, pejzaĝoj aperis en pentraĵoj de frua periodo kiel fono de homa aktivado. En Sui-dinastio (581-618) la pejzaĝa pikturo fariĝis memstara. En tiu periodo ĝi aperis ĉefe en densaj bluaj verdoj kun konturaj strekoj, stile pompa kaj riĉa je dekoracia gusto. La plej frua pentraĵo pri pejzaĝo nun videbla estis "Printempa Ekskurso", farita de Zhan Ziqian de Sui-dinastio. Tiu verko kun natura pejzaĝo de montoj kaj rivero kiel la ĉefa parto prezentas vastan montaron printempan apud ondanta akvo kaj sentigas kareson ze-

firan. La aŭtoro strekis la konturojn per maldikaj linioj kaj koloris or-verde. Li iniciatis la bluverdan pejzaĝan pikturon de Ĉinio, tial la verko estas rigardata kiel "la unua rul-pentraĵo pri pejzaĝo de Ĉinio". Sed sur ĝi montoj viciĝas paralele kaj la arboj similas al etenditaj brakoj kaj fingroj. En tio oni facile rimarkas, ke la pentristo ne trovis ĝustan teknikon en la pentrado. Ĝi spegulas la fizionomion de tia pikturo en la unua etapo de ĝia formiĝo.

En Tang-dinastio (618-907) ekprosperis la pejzaĝa pikturo kaj aperis multaj pentristoj kun malsamaj stiloj. Al iliaj pentraĵoj aplikis ne nur bluverda kolorado sed ankaŭ nuancado per tuĉo. La ĉefaj reprezentaj pentristoj estis Li Sixun kaj lia filo Li Zhaodao, kiuj majstris en pentrado de pejzaĝoj kun pavilonoj kaj haloj per densa kaj pompa kolorado kaj fortaj strekoj, kreis la teknikon prezenti vejnojn, sun- kaj ombro-flankan surfacon de montoj, akvo, arboj kaj ŝtonoj ĉefe per duonseka peniko. Tiel farita pentraĵo ore brila nomiĝis ore blu-verda pejzaĝo. Iliaj verkoj sukcese prezentas la socian fizionomion de Tang-dinastio kaj tiuepokan estetikan penson kaj formis pikturan skolon kun relative granda influo. Krome, aperis nombro da literaturistoj-pentristoj, kiaj Wang Wei, Zhang Zao k.a. Iliaj verkoj karakterizataj de nuancoriĉa tuĉado formis alian skolon. Poste, la du skoloj travivis plurfojajn floradojn kaj malprosperiĝojn kaj fariĝis tradiciaj prezentaj formoj de la ĉina pejzaĝa pikturo.

En la periodo de la Kvin Dinastioj (907-960) kaj Song-dinastio (960-1279), aperis multaj profesiaj pentristoj okupiĝantaj pri pejzaĝopikturo. Multaj verkoj diversastilaj, resumado kaj traktado pri pentraj kriterioj kaj teknikoj formis la unuan altan tajdon de pejzaĝa pikturo en ĝia disvolviĝo. Jing Hao, Guan Tong kaj aliaj pentristoj vi-

vantaj en la nordo dum la Kvin Dinastioj prezentis, per nebulaj montegoj, la imponecon de la senlima naturo. Dong Yuan, Ju Ran kaj aliaj pentristoj aktivadaj en la sudo formis alian stilon pentri ebenan perspektivon kun nebulaj montoj, diafana kaj malhela nubaro per maldensa tuĉado. Laŭ sia observado al la naturo, tiutempaj pentristoj kreis teknikon por prezenti montrokojn, nome duonsekan tuĉadon. Laŭ la aplikataj malsamaj manieroj de duonseka tuĉado, oni povas distingi la stilojn de pentristoj.

En Song-dinastio pli kaj pli maturiĝis la realisma pentrostilo, pentristoj bildigis ne nur pejzaĝojn, sed ankaŭ diversajn facetojn de la socia vivo, kiaj vojaĝo, ekskurso, esplora vojaĝo, loĝado en montaro, fiŝado, kolektado de brulligno, terkulturado, lernado k.a. Pliriĉiĝis ankaŭ la pentra formo. Song-dinastio estis la matura periodo de la realisma stilo de la ĉina pejzaĝa pikturo kaj ankaŭ periodo de perfektigo de ĝiaj teorio kaj teknikoj. En tiu periodo, la pejzaĝopentraĵoj de la Norda Song-dinastio (960-1127) prezentis grandajn montojn kaj vastajn akvojn, majestajn, imponajn aŭ en atmosfero de severaj sezonoj. La gravaj pentristoj tiutempaj estis Li Cheng, Fan Kuan, Guo Xi, Mi Fu, Wang Ximeng kaj aliaj. Kaj tiuj de la Suda Song-dinastio (1127-1279) prezentis ĉarmajn pejzaĝojn kun verdaj montoj kaj bela akvo. La famaj pentristoj tiutempaj estis Li Tang, Liu Songnian, Ma Yuan, Mai Gui, Zhao Boju, Zhao Bosu kaj aliaj. La nun videbla pentraĵo "Mil-lia Lando" de Wang Ximeng estas zorge komponita, delikate desegnita kaj brile kolorigita. "Tri Kantante" de Ma Yuan estas forte tuĉita, kaj en komponado li ofte aranĝis vidaĵojn ĉe anguloj kaj randoj. La pejzaĝopentraĵoj de Zhao Boju estas brilkoloraj kaj teknike rigoraj.


宿雨清畿甸
朝陽麗帝城
豐年人樂業
隴上踏歌行



孫可欒



"Iri Kantante"

de Ma Yuan de la Suda Song-dinastio





"Añutuno" (parto) de Dong Yuan de la periodo de la Kvin Din

"Mil-lia Lando" (parto)
Song-dinastio

de Wang Ximeng de la Norda

p. 8 x p



Poldera pejzaĝo proksime de Roterdamo

FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

de HOOGELAND (Nederlando)

En Roterdamo

